

# ESPERANTO




Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**13 respondoj al  
"Kion atendi en  
la jaro 2000?"**

**Fettes:  
Interlingvismaj  
perspektivoj**

**Tiŝlar pri  
identec-lingvo  
por Eŭropo**



**En 2000 plu lumos nia stelo**

# Vi trovos...

- 1 **Novjara mesaĝo**  
**Ĉiatendence,  
ni marŝu antaŭen...**  
*Kep Enderby*

- 2 **ĈU NI TRANSPAŜAS  
SOJLON?**  
  
*Francjo Veuthey*

- 4 **Ameriko**  
**Krizo falĉas kvanton, ne kvaliton**  
*Rubén Torres - Kolombio*

- 5 **Muziko**  
**Kvarteto Esperanto,  
30 jarojn poste**  
*Ivan Slávik · Slovakio*

- 6 **Malferma Tago**  
**Zamenhof ricevis floron de Tonkin  
Kolokvo pri lingvopolitiko**

- 7 **Forumo**  
**Ni havas solvon,  
sed por kiu problemo?**  
*Zlatko Tišljar*

## 8 Reagoj

- 9 **Esploro**  
**Interlingvismaj  
perspektivoj en  
la nova jarcento**  


*Mark Fettes*

- 13 **Recenzoj**  
**Katelina Halo pri  
Lito apud la fenestro**  
**Nikolao Gudskov pri  
Babile kun mi mem kaj  
Aventuroj en Esperantujo**  
**Probal Daŝgupto pri  
The Grammar of Esperanto**  
**Hektor Alos i Font pri  
Slango kaj ĵargono en Esperanto**



## 15 Laste aperis

## 16 Navige tra TTT-paĝoj

# Kaj plue...

## 17 Loke Foliume

## 18 Influe Persone Oficiala Informilo

## 19 Fake

## 20 Forpasoj

**La kovrilo:** "Sukcesan Novan Jaron per Esperanto!" (Poŝtkarto de Eraldo Sepulcri, eldonita de Triesta E-Asocio kadre de Kampanjo 2000)

**Dekstra paĝo:** NGUYEN Minh Kinh, Kep Enderby, Etsuo Miyoshi (fotis SIBAYAMA Zyun'iti)

## ESPERANTO

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)


Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.  
Grafiko: Francisco L. Veuthey.  
Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.  
Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.  
Legata en 115 landoj.  
Voĉlegata por vidhandikapitoj.  
Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2100, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas double. Rabato por tuja ripeto 20%.  
Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).  
Kreditkartoj: 

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:  
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.  
Telefona: +31-10-436-1044.  
Telefaksa: +31-10-436-1751.  
Retpoŝto: uea@inter.nl.net.  
TTT-paĝo: <http://www.uea.org>  
Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.  
Direktoro de la Centra Oficejo: Pasquale Zapelli.

*Novjara mesaĝo de  
la prezidanto de UEA*



## ĈIATENDENCE, NI MARŜU ANTAŬEN...

La simbole kaj emocie grava jaro 2000, ĉesoĵla al nova miljaro, donas al multaj homoj — signife pli ol aliaj jarkomencoj — emon kontempli la pasintecon, same kiel la estontecon.

Cedante al la sama emo je tiu ĉi historia fojo, mi kaptu la okazon paroli — mi esperas, ne tro filozofie — pri kelkaj aspektoj de nia movado, de nia komunumo kaj de UEA mem, laŭ miaj observoj kaj spertoj dum mia ĝisnuna tempo kiel prezidanto de UEA.

Je la fino de la 20-a jarcento, eĉ se la revoj de niaj pioniroj pri Rapida Fina Venko ankoraŭ ne realiĝas, oni rajtas honeste kaj memfide diri ke la fenomeno Esperanto sendube sukcesis vivteni sin kaj progresi dum tiu ĉi tumultega jarcento, kies konjunkturoj certe ne helpis prosperi ideojn similajn al la nia.

Ni ofte aŭdas akuzajn demandojn: kial ni ne atingis pli? kial la entuziasmo kaj optimismo de niaj pioniroj plejparte velkis? Sed mi respondas per demando: ĉu ni vere rajtis atendi pli ol tio kion ni jam atingis? Se ni rerigardas al nia historio, la honesta respondo devas esti: ne; atendi pli estis utopie kaj tro optimisme.

Tamen, mi forte kredas ke ni rajtas eniri la novan jarmilon optimisme kaj kuraĝe, eble ne kun la espero atingi la samajn celojn, almenaŭ ne sammaniere kiel volis la pioniroj, ĉar iliaj celoj probable ne plu aktualas en la nuna mondo, tiom malsama al la ilia. Frontas

nin, nuntempajn esperantistojn, tute alia mondsituacio. Konforme al ĝi, ankaŭ ni mem, niaj organizoj, niaj sintenoj kaj strukturoj devos ŝanĝiĝi. Fakte, en nia rapide ŝanĝiĝanta mondo ĉiuj organizoj kiuj volas ĝin iel servi, devas konstante sin reformi.

Ne konvenas en novjara mesaĝo profunde trakti pri tio kiaj politikaj, taktikaj aŭ strategiaj ŝanĝoj estas dezirindaj, ekzemple, por UEA. Laŭlonge de la jaro, mi klopodos stimuleme fari kelkajn publikajn sugestojn. Konsekvencajn kritikojn kaj ideojn de ĉiuj interesatoj mi bonvenigas.

Tamen, mallonge kaj esence: kiajn problemojn de tiu speco mi vidas?

Fundamente gravas la fakto ke dum la lastaj jaroj la ĝenerala publiko, precipe gejunuloj, ne multe interesiĝas pri Esperanto. Tio rezultas de la ĉiuhora inundo de tiel nomataj novaĵoj kaj komercocelaj allogaj distraĵoj kiujn la nuntempa publiko tutmonde konstante spertas, kun sinteno ofte priskribita kiel apatio. Esperanto de longe ne kvalifikiĝas kiel inda novaĵo, kaj certe ne kiel komerca logaĵo. Nia idealismo en la moderna mondo klare ne plu sufiĉas sola.

Ni ankaŭ devas kalkuli kun tio ke la antaŭjuĝoj kaj skeptiko de multaj elituloj kontraŭ ni daŭre restos.

☞ p. 5



## La vortoj "la jaro 2000" aspektas tre malsame ol "la jaro 1999". Ĉu ankaŭ la jaro 2000 mem tre malsamos de

# Ĉu ni transp

**K**vankam multaj (prave) insistas ke la jaro 2000 ne uverturas la trian jarmilon, nur fermas la duan, sendube la fakto ke la jarindiko ekde nun komenciĝos per la cifero 2, havos ian psikan efikon. Tamen, mi ne kredas ke tiu efiko estos funda. La procezoj (sociaj, kulturaj — ajnaj) ja ne kutimas noti datojn, ili do fluos plu laŭ siaj ĝisnunaj logiko kaj ritmo. Mi mem ekzemple ĉe ĉiu jarkomenco decidis ĉesi fumi — kaj neniam sukcesis. Mi dubas ke la magia komencifero 2 ŝanĝus ion en tio.

Vilmos Benczik · Hungario

**M**i ne atendas grandegajn ŝanĝojn, vere signifajn por daŭra feliĉigo de la homaro, en 2000, aŭ eĉ en 2001, kiam vera nova jarcento komenciĝos; nur iom da ekstra festado kaj interesaj projektoj, kaj vastan komercan ekspluatadon. Do mi ne kredas ke la Esperanto-movado multe malsamos. Mi suspektas ke ĝi estos malpli troiga kaj ridinda ol multaj aliaj organizoj. Restos la konstanta pacienca laborado de sinoferaj dediĉitaj homoj, la batalo kontraŭ misinformado kaj lingvaj imperialismoj, la kresko de nia kulturo, nia sizifa kaj ofte korprema tasko. Datoj rapide pasos; nia penado persistu.

Marjorie Boulton · Britio

**N**i, kiuj laboras en kaj por Esperanto, sojle de la jaro 2000 sobre konsciu pri la plej urĝe traktenda lingvoproblemo en la nuna mondo.

Necesas tuj altrakti la disduecon inter la "malmolaj" parolsistemoj, uzantaj la plej ĵusajn sciencaĵojn, inĝenieraĵojn kaj armilojn, unuflanke; kaj aliflanke, la "molaj" paroletoj pli lokaj, ofte inaj, celantaj pacen, senarmilaj, uzataj de multaj unuopuloj nesufiĉe informitaj kaj do ne "racie" aspektantaj.

Se ni altraktos tiun disduecon samtempe "racie" kaj "mole", ni havos novan racion, kiu kapablas solidi kiam necesas tiu el la statoj de la materio (solida, likva, gasa, plasma), kaj kiu ankaŭ povas solidari kun aliaj fazoj el niaj cikloj.

Ŝajnas al mi ke sen solvo de tiu lingvoproblemo ni ne plu havos uzeblan planedon, sur kiu solviĝus problemoj aliaj! Esperantistoj, kun longa sperto altrakti alispecan lingvoproblemon, povas valorege kontribui al tiu ĉi monda lingvoproblemo.

Probal Daŝgupto · Barato



**R**ilate la profundajn fluojn de la homa kulturo, tiaj cifersanĝoj estas neglektindaj. Al tiuj kiuj suferas pro jarmilisma febro, mi konsilas relegon de *La infana raso*, ĉapitro IX:

*...tiel longa kronologia distanco troviĝis  
inter Sargono Unua kaj Aleksandro la Granda  
kiel troviĝas inter Aleksandro la Granda  
kaj la nuna epoko, kaj  
samtiel longe antaŭ Sargono Unua  
la homoj loĝadis en urboj  
sub rego sumera  
praktikante religion  
kultivante la teron*

sekve:


*oni rajtas aserti  
ke duono de la civilizodaŭro  
kaj la ŝlosiloj al ĉiuj ĝiaj ĉefaj institucioj  
estas troveblaj antaŭ Sargono Unua."*

Nun oni uzas traktorojn kaj rikoltmaŝinojn, ne plu bovojn kaj falĉilojn. Sed homoj plu fosas sulkojn en la sama tero. Ankoraŭ en la nova jarkalkulo ni fosu nian.

Mark Fettes · Kanado

La jarmilo rezervas surprizon

# Ĉu la lingvo asojlon?



## La jaro 1999 por la Esperanto- movado?" – estis la demando kiun ni starigis al kelkaj elstaraj samlingvanoj. Jen iliaj respondoj.

Ĉu ni povas rimarki ke Esperanto ĝenerale regresas en la riĉmondo. Tion kaŭzas ĝia malkreskanta ŝanco esti la dua lingvo de ĉiuj en internaciaj kontaktoj. Krome iujn elrevigas la fermiteco de UEA. Ni devas ne pretervidi la konsekvencojn: malpliigo de la kotizantoj al UEA, la financoj de la asocio ŝrumpas. Ni do devas reagi al tiu evoluo. Kiel?

– “Esperanto estu la dua lingvo por ĉiu” jam kadukiĝis. Ni trovu aliajn argumentojn por pravigi ĝian uzon.

– Ni adaptu niajn spezojn al la nova situacio: malpli da elspezoj, pli da rimedoj enspezaj.

– UEA estu malfermita al ĉiuj esperantistoj, kaj la estraranoj estu liberaj agadi kun klare difinitaj roloj kaj respondecoj en plena demokratia etoso.

La tria jarmilo certe rezervas surprizon al ni. Jam nun ni antaŭvidu kion ni faru por ke, malgraŭ multaj ŝanĝoj en la mondo, nia afero pluiru kaj Esperanto servu al ĉiuj kiuj ŝatus uzi ĝin.

**GBEGLO Koffi · Togolando**  
Estraro de UEA

La ĉefa lingva problemo en la 21-a jc. ne estos la malsameco de la mondaj lingvoj, sed la unuiga tendenco al unu etna lingvo, la angla. Tiu tendenco akcelos kanibaligon kaj degeneron de naciaj lingvoj, kaj perdiĝon de la kulturo de lingve malfortaj nacioj. Kvankam tuja pragmata neceso kondukas la mondon al tiu tendenco, la monda lingvo-politiko ne permesas ke la angla estu oficialigita kiel komuna lingvo. La problemoj jam estas kriza en EU kaj serioza en UN. La nura politike akceptebla solvo estas agnosko de la neŭtrala lingvo kiel la oficiala komuna lingvo por tiuj kiuj ne volas uzi la anglan. Multaj internaciaj politikistoj konsentas, kaj la ideo estas gajnanta forton. La Seula Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en 1999 adoptis rekomendon peti al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN diskuti la lingvan problemon en sia venonta kunsido. Esperanto estas la lingvo de la 21-a jarcento! Ni devas akordigi nian penson al la nova situacio.

**LEE Chong-Yeong · Koreio**  
Prezidinto de UEA

Ĉu en la jaro 2000 la literaturistoj finfine memoros ke Esperanto estis kreita kun la celo, interalie, ke ĝi estu facile lernebla? Eble 2000 estos la jaro kiam ili ĉesos trakti Esperanton kiel duonbakitan projekton bezonantan evoluhelpon de pli riĉaj lingvoj, kaj rekonos ke ĝi estas sana, funkcia lingvo kun abundaj rimedoj propraj. Tio estas mia espero. Sed en la praktiko – ne, mi ne kredas ke 2000 estos malsama ol 1999.

**Anna Löwenstein · Italio**

La jaron 2000 ni povas interpreti per la cerbo kaj per la koro. Por la cerbo, ĝi estas nur la fino de la 20-a jarcento. Lasta jaro, maljuna kaj laca, ĝi ne plu kapablas ian novaĵon por la homaro... Por la koro, evidentiĝas la grava ŝanĝo ke 19 cedas sian lokon al 20: forpasas la dekada serio kaj fulmas la dudekada! Ni esperu ke nia kolektivo fine komprenos ke Esperanto estas lingvo, ne projekto de lingvo, kaj do neniu plu perdos sian tempon per reformoj, sed ĉiu penu tutmondigi la etoson sen lingvodiskriminacio de nia komunumo... La tria verda jarcento...

**Geraldo Mattos · Brazilo**  
Prezidanto de Akademio de Esperanto

Ĉu eblas respondi al la demando farita? Ĉu eblas verki unu solan frazon sen demandosigno? Ĉu mi – ĉu ni – kapablas respondi al demando pri necerta estonteco? Ĉu la manifestacio organizita de SAT en Bruselo la 1-an de majo 2000 estos la lasta de la 20-a jarcento? Ĉu la nova PIV aperos antaŭ la 31-a de decembro 2000? Ĉu la frazo – mallongigita – de L. L. Zamenhof: “...la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero... ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la *esencon* kaj la *ideon* de la esperantismo” – fariĝos realaĵo? Ĉu, ĉu, ĉu?

**Ivo Peyraut · Francio**  
Prezidanto de la Plenumkomitato de Sennacieca Asocio Tutmonda

# Krizo falĉas kvanton, ne kvaliton

Rubén Torres · Kolombio

**90 jarojn post la apero de Esperanto en tiu lando, la 5-a Kolombia Kongreso de E-o (16-18 okt., Ibageo) estis rimarkinda sukceso.**

Oni povas mezuri sukceson de kongreso per diversaj mezuriloj. Se mezuri per *kvanto*, nia kongreso estis iomete malpli sukcesa ol normale. Meze de gravega ekonomia krizo, multaj simple ne povis alvojaĝi. 34 gesamideanoj aperas en la inaŭgura foto, sed "oficiale" 26 partoprenis.

Se uzi la mezurilon de "semado", la kongreso estis pli ol sukcesa. La loka grupo (pli ol 40 infanoj ricevas regulajn Esperanto-lecionojn en la lernejo San Simón) fariĝis multe pli solida. Dum la inaŭguro la infanoj ricevis sukces-ateston pri la



Aldaj Onaĝi

unua baza Esperanto-kurso en Ibageo.

Granda sukceso ankaŭ *informade*: kvar intervjuoj en lokaj radiostacioj, unua paĝo en la urba gazeto.

Fine, alte mezuriĝis *kulturo kaj klerigo*: i.a. kurso de akademi-estro Geraldo Mattos satigis ĉies apetitojn; Luis Jorge Santos Morales prelegis pri E-o por ĝenerala publiko; amuzis la komedio *Amo per proverboj* de Arturo Azevedo. Rubén Torres voĉigis prelegon de Santiago Álvarez pri "E-o kaj homaj rajtoj".

Propono de Alfonso Álvarez starigi landan TEJO-sekcion renkontis unuaniman akcepton. Oni ĉefe diskutis pri tio kiel oficiale rekonigi Esperanton en Kolombio. Atendeble, ĉe Universitato de Tolimo Esperanto povus esti oficiale enkondukita.

La ĝenerala asembleo de Kolombia Esperanto-Ligo decidis i.a. peti rekomendon de la Akademio pri la kolombiaj urbonomoj; lanĉi bultenon de KEL, kaj komenci diskutojn por starigi regionan Esperanto-blokon kvinlandan. ★

☞ Daŭrigo de p. 3

**M**i ne vidas per kio la jaro 2000 aspektas tre malsame ol la jaro 1999. Por mi ĉiu jaro aspektas kaj tre same kaj tre malsame ol ĉiu alia, laŭ la vidpunkto. Same kiel ĉiu monato, semajno aŭ tago. Sed la jaro 2000 ne aperas pli malsama rilate al 1999 ol 1999 rilate al 1998. Vi ankaŭ demandas ĉu por Esperanto tiu jaro tre diferencos. Nu, mi ne estas profeto. La onta tempo ĉiam estas mistero. Ni vidos.

Claude Piron · Svislando

**M**i ne vidas grandan malsamon de nia movado en la jaro 2000. La intensiĝanta tutmondiĝo precipe en ekonomio faras homojn pli malpaciencaj kaj pli praktikaj. Por la propraj interesoj proksimaj oni vole-nevole elektas la anglan lingvon pro ĝia vasta uzateco. Dume nia movado malforta ankoraŭ ne povas vekti konsiderindan atenton de la publiko al nia lingvo. Tamen mi ne dubas ke ĉio ŝanĝiĝos, kvankam tiu ŝanĝo bezonas longan tempon. La tago kiam plene kaj vere efektiviĝos la homaj rajtoj inkluzive la lingvan, estos la tago kiam solviĝos la lingva problemo, la celo de nia movado. Por tio ni nun devas labori diligente, prudente kaj iniciative.

TAN Xiuzhu · Ĉinio  
Prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo

**L**a nacilingva gazetaro plenas nuntempe je retrospektivoj pri la pasintaj jarcento kaj jarmilo: la humoro aktuala estas retrorigarda. Noktomeze la 31-an de dec. tio ŝanĝiĝos; la demando de 2000 estos: "En kiu mondo ni volas vivi?" Kvankam ekonomiaj realoj daŭre regos, estos loko por relevi konsiderojn moralajn kaj etikajn, i.a. ĉar la espero ke simpla liberigo de merkatoj solvos ĉiujn niajn problemojn, evidente nur parte realiĝis. En tiu kunteksto, labori por lingve pli justa mondo estas okupo ne de revoluloj sed de kuraĝuloj. Ni kaptu la momenton.

Humphrey Tonkin · Usono, prezidinto de UEA

**Lastminute:** Ne gravas ĉu la jaro 2000 post Kristo finas duan jarmilon aŭ komencas trian. Nek ke oni kalkulas jarojn post Kristo, ne post Abrahamo aŭ Mahometo. Gravas uzi tempomarkojn: por kritiki pasintan agadon, mezuri nunajn fortojn kaj plani renoviĝon. Tio okazis je la centjariĝo de E-o kaj ripetiĝas je la dumiljariĝo de la kristana civilizo. Tamen daŭraj ŝanĝoj ne fariĝas unutage, sed plujare. Endas nun daŭrigi ŝanĝojn kometitajn en 1999. Miaflanke, novaj libroj estas la brikoj kiujn mi baldaŭ transdonos al la konstruantoj de la Esperanta ponto al la monda interkompreno.

Sylla Chaves · Brazilo

# Kvarteto Esperanto, 30 jarojn poste

Ivan Slávik · Slovakio

**Partoprenintoj de iuj Esperanto-aranĝoj el la 70-aj jaroj povas memori grupon de kvar slovakaj kantistoj. Post 30 jaroj la kvaropo reaperis.**


**K**varteto Esperanto fondiĝis en la slovakaj urbo Trenčín, kie vivis la elstaraj e-istoj Ján Lamačka kaj Eduard V. Tvarožek (Honora Membro de UEA). Partopreninte en 1969 kurson de Esperanto, la junaj fratoj Bohuš kaj Fero Hanzel ekludis kun sia malgranda rok-grupo ankaŭ kantojn en Esperanto, precipe popolajn kaj popularajn kantojn slovakajn en traduko. Ili aperis en E-renkontiĝoj de Hungario, Pollando, Svedio, Jugoslavio, Aŭstrio kaj Germanio. Invitilon al Britio ili jam ne povis uzi, ĉar iliaj publikaj koncertoj estis malpermesitaj, kaj la grupo disfalis. La grupestro Bohuš Hanzel devis elmigri al Svedio.

Post la revolucio de 1989 la iamaj "kvartetanoj" denove renkontiĝis kaj ekmuzikis, sed precipe por propra

amuzo. La unua publika koncerto de la renovigita grupo, nun sub la nomo Qexteto Esperanto,



**La drumisto de Kvarteto, sur kovrilo de nia revuo, el 1973... kaj la KD de Qexteto, el 1999.**



okazis la 29-an de oktobro 1999 en Trenčín antaŭ 400 aŭskultantoj. Multaj el la iamaj amikoj de la kvarteto fariĝis intertempe eminentuloj en tuta Slovakio. Ĉeestis la urbestro Jozef Žiška, parlamentanoj M. Hort kaj R. Rico k.a. En la solena vespero reprezentantoj de Slovacia E-Federacio, Ján Vajs kaj Lucia Fedorová, salutis la publikon en Esperanto.

Kaj kial la nomo "Qexteto Esperanto"? Ĉar ĉiuj membroj estas oficistoj de la privata entrepreno Q-EX de Bohuš Hanzel, en Trenčín.

Okaze de la renovigo de Kvarteto Esperanto, aperis pri ĝia historio bela, bunte ilustrita, 120-paĝa libro, en la slovakaj kaj Esperanto, kun

kantaro. Krome aperis kompaktdisko kun naŭ kantoj, kiun "baptis" fama muzikisto-verkisto, Pavol Hammel. ★

☞ Daŭrigo de p. 1

Malgraŭ ĉio tio, nia unika Esperanta kultura vivo daŭre pliriĉiĝas kaj kvalite plialtiĝas. Nur unu ekzemplo: konstante eldoniĝas literaturaj verkoj altkvalitaj, tradukitaj kaj originale verkitaĵoj.

Por progresigi nian aferon, ĉiu sin demandas: kion ni faru?

Mia unua kaj plej ĝenerala sugesto estas ke ni strebu plifortigi nian internacian senton de kohereco, sed ne en spirito sekteca, maltolerema aŭ ofenda al aliaj, ĉu e-istoj aŭ ne.

Due, por socia asocio kiu volas agi efike, ege gravas, evidente, la propra strukturo.

Strukture UEA, same kiel ĉiuj internaciaj organizoj, havas multajn problemojn jam pro la fakto mem ke ĝi laboras internacie. La komitatanoj kaj estraranoj de UEA, kvankam statute ili havas la superan gvidrolon en la aferoj de UEA, necese impresas pli malfortaj kaj iom pli amatoraj ol la profesiuloj en la Centra Oficejo, ĉar la unuaj laboras en sia libertempo, dise tra la mondo. Tia kontraŭdira situacio kreas seriozajn problemojn — kiel en ajna asocio celanta agi kaj efike kaj demokratie — pri la kombino de efika gvidado kun efektivaĵoj, ĝustaj, demokratiaj principoj de respondeco. Bedaŭrinde, akcepteblajn solvojn ne facilas trovi.

Trie, ni devas akcepti ke, kvankam la interpopola lingva problemoj mondscale ege gravas, ĝi plejparte ne interesas la ordinarajn homojn.

Do, ree: kion fari?

Mi sugestas ke, daŭre disvastigante la uzon de Esperanto per niaj tradiciaj metodoj, ni pliakiviĝu en aliaj statute permesitaj aferoj, ekzemple, batalante por homaj rajtoj ĝenerale.

Kvankam pri certaj temoj ligas nin statute deviga neŭtraleco, la statuto permesas al ni, fakte eĉ kuraĝigas nin, tion fari. En niaj tiukampaj klopodoj, ni strebu malpligrandigi la distancon inter la "skoloj" por- kaj peresperantaj de nia tuta movado kaj komunumo, kaj pli alproksimiĝi al la peresperanta flanko.

Sendepende de la demando de neŭtraleco, decidi pri la plej bonaj, saĝaj kaj prudentaj reagoj al multaj dornaj demandoj ĉiam restos problemo. Mi kredas ke, post pli ol cent jaroj, ni jam estas sufiĉe maturaj fari taŭgajn decidojn.

Ni ĉiuj ankaŭ iĝu pli toleremaj al la multaj diferencaj opinioj kaj tendencoj en ĉiuj vicoj de nia komunumo, kaj ni atente aŭskultu niajn kritikistojn.

UEA ne estas, kaj ne volas esti, la fonto de ĉiuj saĝoj pri la plej bonaj manieroj progresigi Esperanton kaj, pere de Esperanto, helpi la bonstaton de la mondo. Inkluzivemo, akceptemo, toleremo al ĉiuj fluoj de opinioj estu nia devizo.

Geamikoj, mi ne intencas prediki al vi. Fiere, memfide kaj ĉiatendence, ni marŝu antaŭen.


Mi deziras ke ĉiuj havu feliĉan novan jaron.

Kep Enderby

## ZAMENHOF RICEVIS FLORON DE TONKIN

Ankaŭ la 11-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA pruvis la pravan famon de tiu sukcesa novtipa Esperanto-aranĝo.

**E**ĉe el landoj tiel foraj de Nederlando kiel Bulgario, Finnlando, Svedio, Italio kaj Japanio venis entute 125 vizitantoj por vidi sian domon en Roterdamo kaj ĝui la unikan etoson de tiu aranĝo.



Prelego de Humphrey Tonkin iĝis ankaŭ dialogo kun la publiko.



Alternis "novaj vizaĝoj" kaj kutimuloj.

Tri konataj profesoroj kontribuis prelege al la Tago. Humphrey Tonkin parolis dufoje pri "Muroj de miljaroj: Pensoj antaŭ nova jarmilo". En tre persona prelego, kiu plene kaptis la publikon, li parolis pri sia ŝuldo al Esperanto. Plenkauze li eĉ fiksas florenton al la busto de Zamenhof en la konferencejo de la CO — je granda aplaŭdo de la aŭskultantoj, kies ➔

### Kolokvo pri lingvopolitiko

La ĉeesto de pluraj eminentuloj en la Malferma Tago donis okazon al samtempa kolokvo pri lingvopolitiko. Ĉeestis Detlev Blanke, Osmo Buller, Vladka Chvátalová, Renato Corsetti, Hans Erasmus, István Ertl, Christer Kiselman, Jouko Lindstedt, Marc van Oostendorp, Sandra Schweder, Humphrey Tonkin kaj John Wells. Skribe kontribuis Mark Fettes, Maŭro La Torre, Hans Michael Maitzen kaj Anna Ritamäki.

Ili esprimis la konvinkon ke la esperantologiaj laboroj plenrajte apartenas al la Akademio de Esperanto, kiu devus pli aktive ekroli ĉi-riate. La revuo *Esperantologio/Esperanto Studies*, en kies redaktado kunlaboras akademianoj kaj aliaj esperantologoj, estas jam bona paŝo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED) daŭrigos siajn nunajn agadojn esperantologiajn (bulteno *Informilo por Interlingvistoj*, red. Detlev Blanke; Esperantologiaj Konferencoj dum UK), sed ŝatus pli grandan kunlaboron de la Akademio.

La Esperantologiaj Konferencoj, ekde Tel-Avivo, okazu plurlingve, laŭeble en lokaj universitatoj, kun kaj por neesperantistaj lingvistoj. (Samtempe oni aranĝu E-lingvajn prelegojn pri esperantologio por la kongresanoj.) Por informi lingvistojn pri E-o, oni daŭre invitu ilin al UK.

Lingvopolitiko interna (rilata al la E-movado) kaj ekstera estu tasko precipe por la estraro de UEA, kiu laŭokaze petu konkretan helpon de la Akademio, CED ktp.

La ĝenerala opinio pri Terminologia E-Centro estas ke oni refondu ĝin. Necesas trovi junajn homojn kiuj volos ĝin prizorgi. Reta diskut-listo tiucela estis jam starigita.



### KONSULTEJO RESPOND-PRETA

La Konsultejo de la Akademio de Esperanto estas je la dispono de ĉiuj esperantistoj, unuavice de redaktantoj, ĵurnalistoj kaj verkistoj, por solvi lingvajn dubojn en

mallonga tempo — informas la estraro de la Akademio.

Se vi havas problemojn pri nomado de novaj aferoj, dubojn pri la signifo de iuj vortoj aŭ bezonon je klarigo pri gramatikaj punktoj, sendu mesaĝon al la guidanto de la Konsultejo:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio;  
 ✉ [maul@newsfactory.net](mailto:maul@newsfactory.net).

Vi ricevos respondon de la plej spertaj lingvo-uzantoj.

### NOVAĴOJ PRI LA IJK EN HONKONGO

Aktualigita alĝilo por la 56-a IJK (5-12 aŭg., Honkongo) haveblas de la CO de TEJO (p/a CO de UEA, ✉ [tejo-oficejo@esperanto.org](mailto:tejo-oficejo@esperanto.org)) aŭ ĉe LKK (p/a Ĉina Junulara E-Asocio, P.O. Kesto 77, Beijing, CN-100037 Ĉinio; ✉ [epc@china-report.com](mailto:epc@china-report.com)).

Eblas karavani trajne al Honkongo de Moskvo, tra Siberio, Mongolio kaj Pekino.

Truvi freŝajn informojn sub <http://www.esperanto.org/ijk2000>.



# Ni havas solvon, sed por kiu problemo?

**P**ro la lastatempa plioftiĝo de polemiko pri eŭropa lingva politiko kaj la strategio necesa por la E-movado, mi decidis kontribui al la debato per miaj ideoj — cetere pli detale priskribitaj en mia libro *Eŭropa ideologio*.

La Esperanta strategio ĝis nun ĝenerale estis raciisma. Oni volis konvinki la mondon ke la nuna lingva internacia ordo estas neracia kaj ke la eventuala enkonduko de Esperanto en la internacian vivon estus racia solvo por tiu problemo. Ĝi donos multan utilon al la homaro. Tiu strategio evidente ne influas la mondon, kiun la raciaj argumentoj ne movas, ĉar ja pli gravas la emociaj aspektoj de la grupa vivo (nacioj, ŝtatoj ktp). Ĉiuj rilatigas la gepatran lingvon al iuj emociaj, mistikaj valoroj, kaj tial ŝajnas al ili pli "normale" solvi la internacian lingvan problemon per lernado de iuj fortaj naciaj lingvoj, kiuj ja estas "naturaj", "gepatraj". Kompreneble kontribuas ankaŭ la racia valoro (la scio pri utilo kiun prezentas jam nun la scio de la t.n. "grandaj lingvoj"), sed ĝi ne estas esenca.

## Komunikado kaj identeco

Se ni konsideras ke lingvo havas du egale gravajn aspektojn, la komunikatan (racian) kaj la identecan

(emocian), ni facile konstatas ke Eŭropa Unio esence ne havas komunikatan problemon tuj solvendan. Nome en ĝi oni jam komunikas. Eble laŭ nia Esperanta vidpunkto ne sufiĉe kontentige, sed el la vidpunkto de la plej multaj eŭropanoj tiu problemo ne ekzistas.

al iom-post-ioma disfalo de EU, samkiel pro la sama eraro disfalis Sovetunio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio... Neŭtrala eŭropa lingvo povas esti aŭ iu nacia ne-eŭropa lingvo, aŭ revivigita latina aŭ malnovgreka, aŭ nove ekestinta lingvo kiel Esperanto.



Tiuj kiuj bezonas komuniki (kaj ili estas ankoraŭ granda malplimulto de la loĝantaro) solvis sian problemon per lernado de kelkaj ĉefaj lingvoj (precipe la angla), per pagita tradukado ktp.

La vera problemo kiun EU ne solvis kaj kiun ĝi devas laŭeble urĝe solvi, estas ĝia manko de identeca lingvo. EU devas evoluigi sian identecon, ideologian koncepton je kies bazo ĝi komencos eduki siajn civitanojn ami ne nur sian nacion, sed ankaŭ Eŭropon. Por evoluigi la senton de aparteno al Eŭropo nepras havi lingvon kun kiu identiĝos ĉiuj eŭropanoj kaj kiun ili sentos ame sia, same kiel la nacian lingvon. Por tiu rolo nepras neŭtrala lingvo. Alikaze anstataŭ eŭropa identeco evoluos pli forte la naciaj identecoj, kio kontribuos

## Strategio por ĉiuj niveloj

Sekve nia nova strategio en EU devus strebi al konsciigo de eŭropanoj je ĉiuj niveloj ke la lingva problemo estas solvenda kiel problemo identigila, ne komunikila.

EU devus baldaŭ evolui al federacia ŝtato (por solvi gravajn problemojn kiel la komuna internacia kaj financa politiko, defendpolitiko ktp, kaj ĉefe por ebligi al si efikan agadon je tiuj komunaj niveloj), kaj kiel tia ĝi nepre devos ekevoluigi sian tutŝtatan identecon. Sen tio ne eblas atingi unuecon en gravaj demandoj.

Esperanto estas preta solvo por tiu bezono de Eŭropo.

Tio klare signifas ke en la kazo ke E-o fariĝos eŭropa identeclingvo, ĝi ne pretendos plu la rolon de internacia mondlingvo — ĝi simple fariĝos eŭropa "ŝtata" lingvo.

Ĉu tio kontraŭas la bazajn celojn de la E-movado? Laŭ mi ne. La baza celo de Zamenhof ne estis pli bone komunikigi la mondon, sed helpi al la monda paco, malebligi la militojn. Se Esperanto fariĝos eŭropa ŝtata lingvo, kiun parolos 500 milionoj da homoj, ĝi estos unu el la du mondlingvoj apud la angla. En tiu kazo la aliaj popoloj (ne-usonaj kaj ne-eŭropaj) povos elekti kiun el la du ili lernos por akiri utilojn (modernajn sciojn kaj eblon internacie komuniki), kaj tiam la avantaĝon havos la eŭropa lingvo Esperanto, pro sia lernofacileco. Tiel Esperanto progresos sur la vojo al tutmondiĝo. Sed eĉ se ĝi restos nur eŭropa lingvo, la baza celo de Zamenhof celado la pacon estos atingita, ĉar sen identeclingvo EU ne havas ŝancon ekzisti longperiode: ĝia disfalo post kelkdek jaroj — en momento de eventuala grava ekonomia krizo (neniam en la historio la ekonomia progreso daŭris senĉese), al kiu aldoniĝas la emocia faktoro senti sin lingve ne egalrajta — kondukos al la sekva mondmilito.

Ĉu pli gravas teoria strebo al tuja tutmondeco de Esperanto, aŭ laŭŝtupa progreso, kiu klare kontribuas al la monda paco?

Zlatko Tišljär - Slovenio

ZLATKO TIŠLJAR (1945),  
multflanka E-aktivulo,  
verkisto.

➔ vivon Esperanto same pliriĉigis. Ankaŭ Ignat Bociort estis inspirita de la jarmila ŝanĝo. Li prelegis pri la strategia graveco akiri poziciojn por Esperanto en universitataj kaj sciencaj medioj. Jouko Lindstedt, ĉefredaktoro de la nova *Hejma vortaro*, prilumis la celojn kaj ekeston de tiu verko. Ĉiujn prelegojn sekvis vigla diskuto, kiu pluis en la koridoroj kaj ĉe la kaftablo.

En la biblioteko estis senhalte mont-rataj E-filmoj, dum en la Libroservo kaj la bazaro de esperantaĵoj oni sen-

halte butikumis. La vendoj sumiĝis je 7454 gld. (3382 eŭroj), kio signifis ke dum la Malferma Tago la totalo de la ĉi-jaraj vendoj de la Libroservo de UEA transpasis la sojlon de 300 000 gld., rekordo antaŭe atingita nur unufoje (en 1988).

Plej pinte vendiĝis *Hejma vortaro* (39 ekz.). Krome furoris *Lito apud la fenestro* kaj *Alico en Mirlando* (po 12), kaj *Por aktiva lingvopolitiko* (11). La plej populara kompakta disko estis *Masko* de Kajto (7). ★

## INTERNACIA SEMAJNO DE AMIKEKO



Amikeko trans limoj

Kiel ĉiujare, la lasta plena semajno de februaro (20-26) staros sub la devizo "Amikeco trans limoj". Kreita por konsciigi pri la amikiga rolo de internacia

lingvo, ĝi estas aparte taŭga okazo por aranĝi komunan eventon kun neesperantistoj, kun societoj de aliaj movadoj.

# Reagoj



La kontribuoj aperantaj en ĉi tiu rubriko esprimas la opinion de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

## Medalo plene meritita

La sola fakto ke la Papo (kun majuskla komenc-litero, mi petas, minimume pro respekto al gramatiko) daŭre simpatias al Esperanto, malgraŭ la diversvoĉaj atakoj en esperantistaj eldonaĵoj, sufiĉas por plenmeriti la "medalon de toleremo".

Sed la problemoj ĉi tie estas alia: nenie en la leteroj de D. Vitali kaj R. Pontnau (nov. '99, p. 192) mi legis pri la mil kaj mil intervenoj de la Papo favore al la paco, al mizeruloj kaj malfortuloj, por la disvastigo de frateco, por interreligia dialogo kaj ekumenismo, kontraŭ mortopuno. Tiaj elpaŝoj ne ekzistas por la "reagintoj", kiuj preferas falsajojn diri, nome ke la Papo ne intervenas energie pri "pli tiklaj sociaj temoj".

Kaj se paroli pri la "esperantema" aspekto de la persono, mi opinias ke la elekto de privataj e-istoj doni medalon al Johano Paŭlo la 2-a estas multe pli trafa evento ol (ekzemple) esperi je Unesko: almenaŭ la katolika Eklezio per pluraj agnoskoj multe pli rekonis la valoron de Esperanto ol Unesko, kiu, dum sia ĵusa konferenco en Parizo, aprobis rezolucion favore al trilingvismo kiel atingenda normala kapablo de gejunuloj en la 21-a jc.

Carlo Sarandrea · Italio

## "Packulturi nin mem"

Dankon pro la nobla artikolo de O. Buller (nov. '99, p. 181) pri pacokulturo en la lingvo Esperanto. Ravas min ĉiam denove ke per Esperanto mi renkontas homojn kun tute

diversaj kulturoj kaj personaj starpunktoj, kaj ke tuj ni trovas komunan bazon por pace interŝanĝi niajn opiniojn. Sed ĝuste aludas s-ro Buller: "individuoj malpacas ankaŭ Esperante. Kosciaj aŭ nekosciaj antaŭjuĝoj ankaŭ inter esperantistoj ne mankas". Tion demonstras en la sama kajero du reagoj kies aŭtoroj ŝajne tute ne konas la amason da alvokoj kaj agoj de la Papo por paco, justeco kaj toleremo. Vere: "Ni devas ankoraŭ pac-kulturi nin mem."

Bernhard Eichkorn · Germanio

## La papo kaj la toleremo

Atente mi legis la akrajn reagojn de Daniele Vitali kaj Robert Pontnau koncerne la medalon de toleremo per kiu mi honorigis last-somere la papon, nome i.a. de Fondumo Zamenhof.

Mem homo tolerema, mi respektas ĉiaspecan aliecon; mi do respektas opiniojn malsamajn al la miaj; mi ĝenerale estimas miajn kritikantojn, kvankam kun ili malakordante. Cetere vi pravas, Daniele Vitali, ke Johano Paŭlo altrudas "la vaticanan seksan moralon"; ankaŭ vi pravas, Robert Pontnau, ke li disaŭdigas sian "senkompromisan kontraŭ-kondoman vidpunkton". Tamen, tion farante li turnas sin al la katolikoj, rememorigante al ili la katolikajn regulojn kaj moralon, rezultantajn de la religio kies sekvadon ili libervole akceptas. Neniu ja

estas devigata esti katoliko, eĉ fare de la papo. Mi mem ne estas, kaj miaj vidpunktoj certe malsimilas al la supre menciitaj; tamen mi toleras, mi respektas opiniojn malsamajn al la miaj, i.a. la viajn, Daniele Vitali kaj Robert Pontnau. Same kiel Johano Paŭlo toleras, jes, li toleras, aliajn religiojn, aliajn filozofiojn, ne altrudante katolikajn devojn al la ne-katolikoj.

Bonvolu rimarki ke mi enmanigis al la papo la medalon de toleremo

okaze de ekumena tago dum la papa vojaĝo al Pollando.

Tiam kunvenis multnombraj estroj de tre

diversaj eklezioj; la vortoj "ni ĉiuj de Di" estas filoj", la samaj vortoj sonintaj antaŭ pli ol cent jaroj el la buŝo de Doktoro Zamenhof, estis multfoje ripetataj de ĉiuj diservantoj tie. Tial, prezentante al la papo la medalon de toleremo, mi insistis pri lia signifoplena kontribuo al ekumenismaj celoj: al la toleremo interreligia, al la toleremo de alipensuloj, toleremo injektata, post dumiljara silento, al la katolika religio. Ni rimarku ke, interalie, ene de tiu etoso de toleremo la hebreaĵoj ĉesis esti la "misfama popolo Jesuon krucuminta" (kun la rezulto por tiu popolo, ho ve, tro bone konata), sed ekestis la "fratoj pliaĝaj de kristanoj"!

Per la honorigo, en la nomo de Fondumo Zamenhof, de Johano Paŭlo

la 2-a, pro "interreligia, interfilozofia toleremo", mi absolute ne intencas altrudi mian vidpunkton al iu ajn; mi tamen ŝatus ke mia opinio estu komprenata ene de nia movado, ja pledanta por la principoj de la toleremo.

Dr-ro L. C. Zaleski-Zamenhof · Francio

Red.: Publikiginte la ĉi-suprajn reagojn — i.a. de la iniciatinto kaj transdoninto de la "medalo de toleremo" —, ni konsideras la diskuton en nia revuo finita.

## Laŭdon al multaj

Laŭdante Virtualan E-Bibliotekon, W. Pilger mencias (jul.-aŭg. '99, p. 129) la nombron de Esperantaj literaturaĵoj en la reto. Mi dubas ĉu iu ajn bone komprenas la kvanton de literaturaĵoj nun haveblaj elektronike. Mi mem pasigis tutan semajnfinojn aldonante cent tute novajn erojn al mia listo. Ne mankas eĉ romanoj en Esperanto. Preskaŭ samtempe mi informiĝis pri tradukoj de *Ĉe la koro de la tero* de E. R. Burroughs (Gary Mickle) kaj *Gravitatio Carido* de V. Rybakov (Juri Finkel), kaj mem trovis *Milito kontraŭ salamandroj* de K. Čapek (Miroslav Malovec). Amantoj de infana literaturo povas trovi ĉiujn 14 Oz-romanojn de L. Frank Baum, zorge de Donald Broadribb.

Menciindas tiuj kiuj grandparte donas al mi tiom da lastatempa laboro. Temas pri CHOE Taesok, Juri Finkel, Franko Luin, Miroslav Malovec kaj Kultura E-Centro en Goiânia (Brazilo).

Don Harlow · Usono



Mark Fettes

## INTERLINGVISMĀJ PERSPEKTIVOJ EN LA NOVA JARCENTO

Esperanto nun kompletigas sian unuan “rondan” jarcenton. Mirinda, terura, esperiga, desperiga jarcento ĝi estis. Jarcento antaŭ ĉio de la kreskanta interplektiĝo de ŝtatoj, entreprenoj, popoloj. Kompreneble ekzistas ankaŭ lingva dimensio de tiu interplektiĝo: dimensio pli ampleksa kaj kompleksa ol oni kutime imagas.

**P**er jena eseo mi volas inviti vin iom distanciĝi de tiu simplisma vizio en kiu Esperanto transprenus la tutan ŝarĝon de la monda interlingva komunikado, por pli klare vidi ĝin kiel realan, nemalhaveblan, tamen nur partan kontribuon al pli bona lingvosistemo por la homaro.

### REGNOSTRATEGIOJ KAJ MONDOSTRATEGIOJ

De post la fino de la 15-a jarcento, kiam la pres-tekniko metis la ŝlosilojn de lingvonormigo en la manojn de centristaj regantoj, la ĉefa lingvopolitika-lingvoplana tendenco estis la “regnostrategia”, kiel mi nomos ĝin. Evoluante man-en-mane kun teorioj pri la nacio kaj la ŝtato, la lingvaj regnostrategioj ĝenerale celis krei unulingvajn sistemojn de publika administrado kaj edukado, ĉu sur la tuta teritorio de ŝtato, ĉu sur internaj regionoj bone difinitaj. Tra la 20-a jarcento, dum la plua disvastiĝo de la moderneco alportis tumultajn tutmondajn ŝanĝojn, la regnostrategia lingvoplanado plu defendadis la malnovajn lingvomonopolojn, kaj penadis establi pliajn en la novaj sendependaj ŝtatoj.

Reale, tamen, tiaj “regnostrategioj” ne plu estas adekvataj iloj de nacia aŭ komunuma politiko. Ankoraŭ en la fruaj jardekoj de ĉi tiu jarcento, la novaj naciaj lingvoj havis realan ŝancon kuratingi la standardoportantojn — la anglan, fran-

can kaj germanan — per integriĝo en modernan industrian ekonomion kaj en ĉiujn akompanajn tekstumajn normojn. Sed jam la epoko ŝanĝiĝis. Landaj ekonomioj integriĝis tutmonden, ekmigradis la mono kaj la laboristoj, ĝis nekredeble rapidiĝis la teknologia evoluo, kaj nun la eksploda kresko de komunik- kaj informretoj minacas “neniigi la spacon”, kiel tekstas aktuala frapfrazo. Pli kaj pli, ĉiu lingvokomunumo estas devigata serĉi sian lokon en dinamika tutmonda lingvosistemo, kiun karakterizas vastaj kaj kreskantaj diferencoj en statuso kaj uzado.

La estonta evoluo de ĉi tiu sistemo parte dependas de la rimedoj uzataj por sendi informojn kaj ideojn trans lingvolimojn. Tiuj ĉi inkluzivas tradukadon homan aŭ maŝinan, amasan plurlingvecon, kaj la disvastiĝon de interlingvoj — ĉu lingvoj kun potenca politika kaj ekonomia bazo, kiel la angla, ĉu “planitaj” internaciaj lingvoj, kiel Esperanto. En artikolo (legebla ĉe <http://esperantico.org/estf/ismo.htm>), Jonathan Pool kaj mi evoluigis la ideon ke tiuj rimedoj povus kunkontribui al la estigo de mondo lingve diversa, integriĝita, egaleca, rimedoŝpara kaj stabila — laŭ nia termino, *interlingvisma* mondo. Bedaŭrinde, kiel ni konstatis, la esplorado kaj pensado pri interlingvismo ĝis nun koncentriĝis ĉe la unuopaj interlingvaj sistemoj: la Mondanglistoj malestimas la Esperantistojn (kaj inverse), la Plurlingvistoj malhavas kontakton kun la Teknikistoj, kaj la Lingvo-Peristoj apenaŭ

havas motivon esplori ekster la limoj de sia profesio.

Tamen, en epoko kiam lingvaj “regnostrategioj” cedas lokon al “mondostrategioj” — tio estas, kiam la defendado de lokaj interesoj pli kaj pli postulas la difinon kaj protektadon de aparta niĉo en la tutmonda lingva ekosistemo — la lingvopolitikistoj devos vole-nevole alfronti la influon de ĉi tiuj diversaj interlingvaj ideoj kaj teknikoj, unuope kaj are, al la sistemo kiel tuto kaj al difinitaj komunumoj en ĝi. La regnostrategia epoko kondukis al ekstreme hierarkia distribuo de lingvaj scioj kaj rimedoj, kaj en kaj inter la ŝtatoj. Ekzemple, la landaj elitoj ĝenerale havas lingvan profilon tre malsimilan al tiu de la kampara aŭ laborista loĝantaroj; landaj profiloj siavice tre malsimilas inter la industriaj landoj kaj la baraktantaj ekskolonioj de la sudo; kaj inter la lingvoj mem la spektro etendiĝas ekde la sistemo de interligitaj lingvovariaĵoj nomata “la angla”, kiu okupas nun senprecedentan kaj senrivalan gamon da niĉoj en la monda lingvosistemo, ĝis la multaj parolaj lingvoj indiĝenaj kiuj nun suferas drastan malkreskon. La evidenta maljusteco kaj dubinda daŭripovo de ĉi tiu sistemo spegulas, mi kredas, la “leĝofaran impulson” de l’ modernio, sub kies influo la regnostrategiistoj revis atingi integriĝon per asimilado kaj efikecon per maŝinigo. La interlingvismo proponas alternativan perspektivon.

**PLURLINGVISMO KAJ  
MONDANGLISMO**

Pool kaj mi priskribis jene la unuan interlingvan ideon:

**Plurlingvismo.** Interlingvismo povus realiĝi en mondo kie la sciado de multaj lingvoj estas same kutima kiel la konado de multaj homoj. Se oni atingus kvalitan kaj universale aplikeblan progreson en la metodiko de lingvo-instruado, kaj se plialtiĝus la taksata valoro de individua plurlingveco, tiuj kiuj bezonus komuniki trans lingvajn barojn kutime posedus, aŭ povus facile akiri, la necesan kapablon.

Varianto de ĉi tiu ideo, kiun oni povus nomi Elita Plurlingvismo, jam delonge estas konata en la industriaj landoj, precipe la malpli grandaj. Eĉ kie la instruado de fremdaj lingvoj estis ĝenerala aŭ eĉ deviga en la landa instruprograme, ĉiam oni servote akceptis la ideon ke nur eta malplimulto devas atingi funkciajn plurlingvecon; kaj, eĉ kie la landa loĝantaro inkluzivas multajn parolantojn de aliaj lingvoj, oni servote malakceptis konsideri ilin kiel lingvan valorajn, ĉar pli gravas, *kiu* estas plurlingva, kaj en *kiuj medioj*, ol la nura fakto de lingvoscio. Nur en esceptaj okazoj, kiel en Luksemburgio, la individua plurlingveco iĝis indikilo de nacia identeco, kaj tie tri lingvoj (la luksemburga, franca kaj germana) disdividas inter si la terenojn de lingvo-uzado. Amasa plurlingveco en funkcie ekvivalentaj lingvoj — kiun oni povus nomi Civita Plurlingveco — restas ankoraŭ nur ideo.

Ideoj, tamen, havas potencon. Ĝis nun Eŭropa Unio nur *anoncis* universalan celon de individua trilingveco, ne multe klopodante ĝin realiĝi. Se ĉi tio tamen iĝus ĝenerale akceptita idealo, ĝi povus konduki al profundaj ŝanĝoj en landaj edukistemoj, laŭ la modelo de la Eŭropaj Lernejoj aŭ aliaj eksperimentoj pri plurlingva kaj plurkultura edukado. Por gardi kontraŭ amaskurado al la pli grandaj lingvoj oni povus postuli ke studentoj elektu kaj grandan kaj malgrandan lingvojn apud la propra. Kelkaj versioj de ĉi tiu sistemo povus inkluzivi eŭropajn regionajn kaj minoritatajn lingvojn; aliaj lingvojn de enmigrintoj aŭ de neeŭropaj landoj. Kvankam la gamo de pedagogiaj ebloj estas granda, tiu de politikaj ebloj ŝajnas multe pli limigita, pro la postlasaĵoj de la regnostrategia epoko kaj la disvastiĝo de alia interlingva ideo: Mondanglismo.

Pool kaj mi resumis ĝin jene:

**Mondanglismo.** La plej disvastigita dua lingvo de la nuntempo, la angla, povus fundamenti interlingvismon per sia integriĝo en edukajn kaj sociajn sistemojn tutmonde, tiel ke iu ajn povus alproprigi ĝin je minimuma kosto. Unu varianto de la Mondanglismo estas unulingvismo; aliflanke, se la plimulto de la nedenskaj parolantoj de la angla elektus plukultivi

siajn aŭtohtonajn lingvojn, kaj se ekzistus kompenso por tialaj ekonomiaj aŭ sociaj ŝarĝoj, la angla povus iĝi "ĉies propra lingvo" inter kaj apud multaj aliaj lingvoj.

La ideoj de Mondanglismo kaj Plurlingvismo originis ambaŭ en la regnostrategia epoko,

sed la unua, influata de la intelektaj kaj popolaj tradicioj de Usono, plu tenas ian popularan allogon kiun la alia neniam akiris. Dum Plurlingvismo asociiĝas kun naciaj kulturoj kaj "alta" stilo de komunikado, Mondanglismo asociiĝas kun la internaciaj fortoj de la merkato kaj vulgara, "demokratia" stilo. Plue, kiel ajn kompleksaj estas la lingvaj kaj sociaj realoj kiuj fundamentas ĝin, Mondanglismo estas *simpla* ideo. En epoko kiam la tutmondiĝo fizike konstatablas ĉe la plej proksima trinkajaŭtomato aŭ televidilo, la angla posedas perfekte kongruan "komercan markon" inter la lingvoj. Kaj ĝiaj porparolantoj havas multajn faktojn ĉe sia flanko: la anglan oni pli kaj pli postulas por altnivelaj postenoj ĉie en la mondo; ĝi estas la plej studata fremda lingvo; ĝi superregas en satelitaj televidprogramoj ktp.

Ĉi tiuj du interlingvaj ideoj troviĝas en rekta konkurenco en landaj edukistemoj. Ambaŭ implicas radikalan reformojn de bone establitaj burokrataroj kaj pedagogiaj kulturoj — reformojn kiuj postulus longdaŭran politikan volon por sukcesi. Kvankam Plurlingvismo povas supraĵe aspekti kiel pli komplika kaj tial pli malfacile realigebla, la unuformeco de la Monda Angla povas efektive prezenti pli grandajn problemojn, ekzemple se temas pri la trejnado de grandegaj nombroj da

instruistoj en lingvo tre malsama al lingvoj indiĝenaj kaj regionaj. (Estas notinde ke la eŭropaj landoj kiuj plej proksimiĝis al la mondanglisma modelo, la skandinaviaj kaj Nederlando, estas ankaŭ tiuj plej proksimaj al la anglosaksa mondo, lingve kaj kulture.) Politike, Plurlingvismon favoras tendencoj al malcentrigo ene de ŝtatoj kaj regionigo inter ŝtatoj; en tiu okazo, la angla povus ankoraŭ gardi niĉon kiel helplingvo por komunikaj situacioj kiam naciaj aŭ regionaj lingvoj ne sufiĉas. Ĉi tiu funkcio povas esti tre grava en certaj specoj de transnacia entrepreno, sed nur margene rilatas al la ekonomiaj kaj kulturaj agadoj de la granda plimulto de la homoj.

Surbaze de ĉi tiaj konsideroj mi konkludas ke la niĉo okupata de la angla en la monda ekonomio, en amaskulturo kaj en la plej multaj landaj edukistemoj verŝajne ne plivastiĝos tiel kiel antaŭvidas la Mondanglismo. Malgraŭ tio, la mondanglisma ideo plu havos gravan influon al naciaj kaj regionaj mondostrategioj, tiel ke eĉ tie kie Plurlingvismo estis formulita kiel idealo, la realo povos esti tute alia.

En Eŭropo plej verŝajnas, mezperspektive, kombiniĝo de Elita Plurlingvismo kun iuspeca Angla por Konsumentoj: t.e., la plej moviĝemaj kaj kleraj sociaj tavoloj celos aktive regi plurajn lingvojn, dum la ceteraj kontentiĝos per limigita, ĉefe pasiva scio

de la angla. Ĉi tiu arango povos obliĝi alimondparte, kiam naciaj kaj regionaj lingvoj transprenos la ekonomiajn, teknikajn kaj kulturajn niĉojn kiujn la angla pioniris. Bedaŭrinde, tia kompromiso, kiu relative bone kongruas kun aktualaj edukistemoj kaj instrupraktikoj, tute malsufiĉos por garanti la lingvan diversecon, integriĝon

kaj egalecon, kiujn celas tiuj du variantoj de interlingvismo.

**LINGVO-PERADO KAJ  
TEKNIKISMO**

Dum Plurlingvismo kaj Mondanglismo baziĝas sur persona du-, tri- aŭ plurlingveco, ankaŭ unulingvuloj povas komuniki trans lingvolimojn, se ili disponas pri konvenaj iloj aŭ servoj. Dum jarcento aŭ pli, la regnostrategioj de la lingvoj, kultivante siajn unulingvajn popolojn, samtempe estigis fekundan grundon por la kresko de la "lingvoindustrioj" kaj kun ili plian interlingvan ideon, kiun Pool kaj mi priskribis jene:

*Kontraŭ amaskurado al la  
pli grandaj lingvoj*



*studentoj elektu kaj grandan  
kaj malgrandan lingvojn  
apud la propra.*

*Mondanglismo  
asociiĝas kun  
la internaciaj  
fortoj de la  
merkato kaj  
vulgara,  
"demokratia"  
stilo.*



**Lingvo-Perado.** Profesiaj tradukistoj kaj interpretistoj povus konstrui interlingvan mondon, ebligante al malsamlingvanoj sukcese komuniki malgraŭ tre diversaj spertoj kaj kredoj. Se iĝus normale ke oni adaptas la komunikadon al la postuloj de interpretado, kaj se la tradukistoj kaj interpretistoj laborus sufiĉe multnombro kaj efike, plej multaj homoj povus kultivi la propran lingvon kaj partopreni la interlingvan komunikadon, tamen evitante la ŝarĝojn kaj riskojn de grandskala lingvolernado.

La politikaj dimensioj de Lingvo-Perado estas plej evidentaj en multnaciaj institucioj kiel Ligo de Nacioj, UN kaj Eŭropa Unio, kie la egaleca traktado de la laborlingvoj estas konstanta fonto de disputoj. Fakte, ĉiu el tiuj tri organizaĵoj ĉiam dependis de Elita Plurlingvismo por suplementi la laboron de la lingvoservoj: se ĉiuj reprezentantoj kaj fakuloj insistas uzi nur sian "oficialan" lingvon, la sistemo tre verŝajne kolapsus. Efektive nur anglalingvanoj ĝenerale akceptas kiel evidentajn sian rajton lingvon en ĉiuj cirkonstancoj.



*Efektive nur anglalingvanoj ĝenerale akceptas kiel evidentajn sian rajton lingvon en ĉiuj cirkonstancoj.*

Por ke la Lingvo-Perado vere realigu la altajn nivelojn de diverseco, integriĝo kaj egaleco postulatajn de interlingvismo, iliaj servoj devas iĝi multe pli efikaj kaj malpli multekostaj. Ĉi tion promesas parenca interlingva ideo:

**Teknikismo.** Ŝajnaj malkongruoj en la koncepto de interlingvismo povus solviĝi per teknika progreso. Se eblus analizi kaj kodigi la kompleksaĵojn de gramatiko, signifo kaj komunika strategia, lingvaj baroj povus tute malaperi cede al plene aŭtomata interpretado inter la lingvoj de la mondo, aŭ esti anstataŭataj de novaj, aŭtomataj, senlingvaj aŭ translingvaj komunikiloj.


Antaŭ la apero de rapidegaj personaj komputiloj kaj Interret-konektoj, aŭtomata tradukado kaj multlingvaj programoj ekzistis ĉefe kiel specialigitaj kaj multekostaj servoj por grandaj firmaoj kaj registaroj. Hodiaŭ krudaj tradukoj inter la plej gravaj lingvoj estas tuj riceveblaj

en la reto, multlingvajn kapablojn inkluzivas vaste vendataj programvaroj kiel Office 2000 de Microsoft, kaj Interreto survojas al kongruo kun ĉiu skriba lingvo en la mondo. Samtempe la taksoj de spertuloj pri la ebloj de multlingva teknologio multe pli sobriĝis. Oni nun pensas ke "plene aŭtomata tradukado" postulus homsimilan artefaritan intelekton — ankoraŭ tre fora celo. Multe da laboro nun fokusiĝas al la kreado de "kontrolataj lingvoj" por specifaj celoj, dum la revoĵo pri tuj tradukado de neformala, spontana parolo estas lasitaj, por nun, al la fantascienco.

Tamen la kombino de homa kaj aŭtomata tradukado pli kaj pli ebligas proksimiĝi, almenaŭ en certaj cirkonstancoj, al la interlingva idealo. Sekvante Minako O'Hagan, mi nomos ĉi tion la "Teletraduka" ideo. Laŭ ŝia tezo, la eksploda kresko de telekomunikado kreas kaj senprecedentan postulon pri lingvoservoj kaj novan rimedon por liveri tiujn servojn. La interligado de tradukistoj ĉirkaŭ la mondo kun fakaj spertuloj, inteligentaj multlingvaj datumbankoj, sistemoj de aŭtomata tradukado kaj la provizantoj de telekomunikaj servoj baldaŭ iĝos "lingvo-peristojn" alireblaj en ĉiu momento, el ĉiu loko sur la planedo, je kostoj facile pageblaj por etaj entreprenoj kaj eble eĉ individuoj. Teletradukado ne forigos lingvobarojn, sed ĝi multe malaltigos ilin, almenaŭ por la lingvoj ekipitaj por partopreni en ĉi tiu teknika revolucio. Eblas jam antaŭvidi epokon, ekzemple, kiam plejparte malaperos la malavantaĝoj ligitaj al la uzado de la naciaj lingvoj de la malpli grandaj industriaj landoj por publikigi artikolon aŭ datumbankon, ĉar resumoj kaj referencoj libere cirkulados en la lingvoj de la industria mondo, kaj bonkvalitaj, malmultekostaj tradukoj estos riceveblaj laŭpete.

La granda demando estas ĝis kiu nivelo en la lingvohierarkio ĉi tiu revolucio etendiĝos malsupren. Teletradukado sek-

vas la merkaton kaj dependas parte de lingvospecifa investado: ĉu ĝi profitigos centojn aŭ milojn da lingvoj, aŭ nur kelkdekon? La respondo al tio, same kiel en la kazo de Plurlingvismo, dependos de politika volo kaj ekonomiaj cirkonstancoj. Se Teletradukado iĝus konsiderata kiel baza servo, plia dimensio de la "rajto je komunikado", tiam landaj registaroj kaj internaciaj institucioj eventuale garantius certan nivelon de infrastrukturo kaj servoprovizado por larĝa gamo da lingvoj, eĉ se pli multaj



*Plene aŭtomata tradukado postulus homsimilan artefaritan intelekton.*

kaj pli bonaj servoj estus haveblaj en la pli grandaj lingvoj. Aliflanke, Teletradukado eble restos profitcentra industrio, grava nur por tiuj malmultaj lingvoj kiuj jam okupis ŝlosilajn niĉojn en la industria ekonomioj. Oni ne subtaksu la malfacilaĵojn kaj kostojn en la evoluigo de altnivela lingvaj iloj kaj la trejnado de kompetentaj lingvoperistoj en minoritataj, indiĝenaj kaj parolaj lingvoj, nek la malfacilecon integri tiajn servojn en lingvokomunumojn kies interlingvaj bezonoj tradicie plenumiĝis alimaniere.

Tamen, eĉ la malplej radikala scenaro ŝajnas enteni ian malfortigon de Elita Plurlingvismo kiel interlingva ideo: pli kaj pli, oni rigardos la investadon de tempo kaj energio por akiri limigitan kapablon en pluraj normaj lingvoj kiel pli koston kaj malpli efikan solvon ol la uzado de altkvalitaj profesiaj servoj. Kredeble, ĉi tiu evoluo povus fortigi Mondanglismom, se la dezirantoj de aktiva dulingveco amase turnus sin al la plej studata fremda lingvo; aliflanke, tradukado al kaj el la angla konsistigas ankaŭ la plej allogan lingvoteknikan merkaton, kio signifas ke la marĝena profito pro lernado de la angla verŝajne falos pli rapide ol la gajnoj pro lernado de aliaj lingvoj. Tio povus esti speciale grava por la parolantoj de la ĉina, japana, korea, taja, kaj aliaj grandaj lingvoj de Azio, por kiuj la aktiva regado de la angla kostas aparte grandajn investojn. Kiam Teletradukado disvastiĝos tra la tuta azia regiono, la tiea uzado de la angla povus forŝlifiĝi iom post iom, tiel subfosante la kredindecon de Mondanglismo kiel interlingva ideo. Ĉu tiam povus disvastiĝi regiona idealo de Civita Plurlingvismo? Eĉ se jes, verŝajnas ke, pro obstina fido al tradiciaj edukstrukturaj kaj merkataj fortoj, la rezultoj de lingvolernado kaj lingvoperado ankoraŭ longe postrestos la interlingvan idealon.

## ESPERANTISMO KAJ LINGVO-EKOLOGIO

La plej granda malkongruo inter idealo kaj realo kredeble troviĝas en la kvina interlingva ideo, kiun Pool kaj mi karakterizis jene:

**Esperantismo.** Inventita lingvo (ne nepre Esperanto mem), planita kiel tutmonda dua lingvo en kiu fluenco estas relative facile atingebla, povus esti bazo por interlingvismo. Se establiĝas la kutimo uzi tian lingvon por interlingva komunikado de ĉiuj specoj, la kostoj de lingva adaptiĝo fariĝus malaltaj kaj egalaj por ĉiuj. Se la lingvo gardus sian karakteron de dua lingvo, la dulingveco iĝus ĝenerala, preskaŭ universala trajto.

Esperanto estas vivrealaĵo por sia komunumo de uzantoj, kiuj bazas siajn argumentojn por Esperantismo sur la propraj spertoj. Kvalite, ilin subtenas kontroleblaj faktoj: la Esperanto-komunumo efektive elmontras altajn nivelojn de lingvaj diverseco, integriĝo, egaleco kaj efikeco, ĝuste kiel postulas la interlingvismo. Tamen kvante la faktoj estas tute ne konvinkaj. Ekzistas nun iomete pli ol 7000 individuaj membroj de UEA kaj iom pli ol 20 000 membroj de ĝiaj aligitaj landaj asocioj; eĉ se ĉi tio reprezentus nur 20% de la aktivaj uzantoj de Esperanto (kio ŝajnas al mi prudenta takso), ĉi tiuj nombrus malpli ol 150 000, aŭ ĉirkaŭ 1 homo el 40 000 inter la monda loĝantaro. Sendube ĉi tio estas malmulto kompare kun la tutmonda kvanto de plurlingvaj individuoj, parolantoj de la angla kiel dua lingvo kaj uzantoj de tekstoj tradukitaj de homoj aŭ per komputiloj.

Kvankam oni devas konsideri multajn faktorojn por klarigi la tre limigitan akcepton de Esperanto (kaj la eĉ pli limigitan akcepton de ĝiaj rivaloj), tio kio plej klare distingas ĝin de la aliaj kvar interlingvaj ideoj, estas ĝia malkongruo kun regnostrategia pensado. Plurlingvismo, Mondanglismo, Lingvo-Perado kaj Teknikismo ĉiuj kreskis el provoj, sub ŝtataj aŭspicioj, kombini *nacian* unulingvecon kun *internaciaj* komerco kaj diplomatio; ĉiu el ili montras hierarkian tendencan favori elitojn super la popolamasoj, riĉajn lingvojn super malriĉaj. Esperantismo evoluis kiel malo de ĉi tiuj

tendencoj: ĝi komenciĝis kiel pledo por justeco por malpli privilegiaj lingvogrupoj kaj evoluis responde al la bezonoj de relative egalrajta, transnacia komunumo de individuoj. Sekve, ĝia sociolingvistika profilo tre malsimilas de la naciaj kaj minoritataj lingvoj, pri kiuj okupiĝas la landaj politikistoj. Eĉ en ŝtataj kaj interŝtataj organizaĵoj kie E-asocioj ricevis oficialan aprobon kaj subtenon por sia agado, Esperanto mem neniam estis konsiderata kiel grava punkto en la regnostrategia tagordo.

Stariĝas do la demando ĉu tiu ĉi situacio povos ŝanĝiĝi en la mondostrategia epoko, kaj kion entenus realeca versio de Esperantismo. Same kiel ĉe la aliaj interlingvaj ideoj, mankas klara evolu-vojo ekde la nuna monda lingvosistemo ĝis Esperantismo en ĝia pura formo. Aliflanke, en mondo pli kaj pli interligita, kie Plurlingvismo restas privilegio de naciaj elitoj, Mondanglismo estas ligita al tutmonda konsumkulturo, kaj Teletradukado orientiĝas al la postuloj de la industriaj ekonomioj, la interlingva niĉo de Esperantismo havas grandan potencialon por kresko. La mondostrategiistoj de la plej grandaj kaj riĉaj lingvoj verŝajne ne multe atentis ĝin, sed malpli alte en la lingvohierarkio ĝi eble iam serioze konsideriĝos kiel elemento de

kolektiva mondostrategio, kiu pruntas el ĉiuj kvin interlingvaj ideoj.

**Lingvo-ekologio.** Ĉi tiun tutecan mondostrategion oni povus nomi "lingvo-ekologio". Ĝi estos strategio farita ne por trudi unu lingvon aŭ lingvospecon super aliaj — kiel en regnostrategiaj aliroj — sed por certigi ilian konekzistadon. Kongrue kun la principoj de interlingvismo, ĝi serĉos plej bonan ekvilibron inter lingvaj diverseco, integriĝo, egaleco, efikeco kaj stabileco, integrigante solvojn de la loka ĝis la tutmonda niveloj. Ĝenerale ĝi rezistos unuformecon kaj la klopodojn igi

ĉiujn lingvojn intertradukeblaj: la funkcioj de la normaj naciaj lingvoj ne konsideriĝos kiel universala mezurilo de lingva valoro, sed kiel unu eta parto de vasta gamo da lingvaj ebloj, esplorindaj kaj evoluigindaj. Ĝia

koncepto pri lingvaj rajtoj akcentos la bezonon protekti kaj fortigi la reciprokajn rilatojn kiuj kunligas individuojn en komunumojn, kadre de pli larĝa politika projekto de "fratularoj". Supraĵe, la lingvomozaiko kiun ĝi celos konservi, similos la nunan, kun grandaj lingvoj kaj malgrandaj, naciaj kaj senŝtataj, normigitaj kaj parolaj. Nur la rilatoj inter ĉi tiuj lingvokomunumo ŝanĝiĝos, per la influo de plurlingva


edukado, teletradukado, kaj la pli ofta uzado de Esperanto — ne kiel ia anstataŭaĵo de la Mondangla, konkuranta ĉe la supro de la regnostrategia hierarkio, sed kiel tutmonda "vernakla" (propra, hejma, malfremda) lingvo, kiu povos flori apud lingvoj ĉe ĉiu nivelo de la monda lingvosistemo.

Kiel la nomo sugestas, lingvo-ekologio, se ĝi realiĝos, estos parto de tiu pli vasta transformiĝo de la homa konscio kiun Fritjof Capra nomis "ekologia pensado" aŭ "la sistem-perspektivo". Iugrade tia ŝanĝo estas jam trudata al ni pro la ekologiaj kaj sociaj konsekvencoj de la tutmondiĝo, sed malnovaj ide-ŝablonoj longe persistos en niaj politikaj kaj intelektaj sistemoj, igante la transiron longdaŭra, konfliktoplena kaj malcerta. Bedaŭrinde, multaj lingvoj en la mondo ne povos tiom longe atendi, por ne paroli pri la multegaj homoj kiuj nun suferas sub diversaj specoj de lingva diskriminacio, aŭ pro la enormaj malegalecoj kaj malŝparoj kiuj plu afliktas interlingvan komunikadon en la Interreta epoko. Sed mi esperas, almenaŭ, ke ni esperantistoj pretos pacienci, helpi savi la saveblan, fari la farindan, kaj klopodi mem pli bone kompreni tiun revigan kaj elrevigan mondon kies interkompreniĝo ni alcelas. Tiucele necesos akcepti, interalie, ke ni monopolas nek idealojn nek solvojn sur la kampo de interlingva komunikado. Nur senigitaj de tiaj absolutismaj pretendoj, ni kapablos sentime kaj senhonte eniri la novan jarcenton.


Originala titolo: The Geostrategies of Interlingualism  
Tradukis el la angla Edmund Grimley Evans



*estos parto de pli vasta transformiĝo de la homa konscio...*



*Stariĝas do la demando... kion entenus realeca versio de Esperantismo.*



# Recenzoj

Beletra

## Monumento al granda animo

**Lito apud la fenestro.** Betty Salt (1907-94). Ilustraĵoj de F. L. Veuthey. Rotterdam: UEA, 1999. 108p. 21cm. € 4,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Jen la kolektitaj verkoj de Betty Salt, kiu multe servis la kanadan movadon, ekde sia esperantistiĝo en 1961. Honora membreco de UEA en 1980 rekompencis ŝin sed ne haltigis ŝian aktivadon; tion faris nur ŝia morto en 1994, je la aĝo de preskaŭ naŭdek jaroj.

Ŝiaj tri mallongaj teatraĵetoj (unu en kvar partoj) bone montras ŝian komprenon de tio kion kapablas fari progresantoj-klubanoj. Simplaj konataj historioj, kies roluloj nombras de kvin ĝis dek unu kune kun "homamasoj", rakontiĝas per familiaraj, tre lerneblaj dialogoj. Nur la enscenigado, kie ekzemple juĝisto prezidas ĉe tribunalo, ebriulo "rulfalas sur la plankon", "Merkurio plonĝas en la akvon", prezentas defiojn kiujn reĝisoro kun sia trupo akceptos kun ĝojo.

En ok poemoj (du tradukitaj) leganto vidas ke, pli ol impona ritmo aŭ lula harmonio, gravis por Betty Salt koncizo, kerneco kaj vizio de mondo kie regas malĝojo, malsano, morto, sed ankaŭ beleco, ĝojo kaj kuraĝo:



*Li estis tia hom', kiu sub la ter'  
hakante polvan karbon ĉirkaŭ si,  
tiris ĉielon bluan el sia anim'...*

## Viva historio

**Babile kun mi mem.** Poul Thorsen (1915). Brabrand: Beletra, 1996. 105p. 21cm. € 9,90.

**Aventuroj en Esperantujo.** Ralph Harry (1917). Sidney: Aŭstralia E-Asocio, 1994. 81p. 21cm. € 5,45.

Ne novas la ideo: la historio konsistas el apartaj agoj kaj vivoj de la homoj. Tamen, se la homoj ne lasus atestojn pri siaj agoj, tiuj kvazaŭ malaperus el la historio! Tial specialan signifon havas rememoroj de niaj gravuloj, multon farintaj por la disvastigo de nia lingvo kaj kontribuintaj al nia kulturo.

La libro de Thorsen estas verkita en sufiĉe leĝera, ofte preskaŭ konversacia stilo — do, ne hazarde ĝi estas difinita kiel "babilo". Ĝi bone vidigas sur fono de la dana historio la vivon de la aŭtoro, fama esperantisto-vagabondo, poeto kaj movadano. La danaj vivo kaj moroj estas pentritaj per avaraj, sed des pli elokventaj peniktituroj. Pluraj renkontiĝoj kun famaj esperantistoj estas priskribitaj. Poemoj kaj malnovaj recenzoj tute kohera pliriĉigas la rakont-teksaĵon. Babilado kun si mem, se oni estas vere saĝa persono, fariĝas interesa ankaŭ por aliaj.

La libro de Harry, iama aŭstralia ambasadoro ĉe UN, multflanke similas la faman libron de alia esperantisto-diplomato — Edmond Privat. Ĝi same nomiĝas *Aventuroj*, kaj same konsistas el apartaj eseetoj, kiuj origine estis radielsendoj. Diference

Sed estas la rakontoj, plenigantaj pli ol la duonon de la centpaĝa volumo, en kiuj Betty Salt montras siajn talentegojn, oni diru eble sian genion. Ŝia stilo estas, kiel en ŝiaj teatraĵoj, simpla, klara, eleganta, preskaŭ fundamenta, kvankam sen eksmodaĵoj same kiel sen modernismo. Oni serĉus vane ĉu lingvajn erarojn, ĉu ion tro malklaran por progresanta leganto. En tiu stilo, foje senemocie, foje simpatie, foje ironie, ŝi rakontas tragikaĵojn, komikaĵojn, kortuŝaĵojn, kaj plej ofte misterojn kie rolas mirindaj koincidoj, telepatio, antaŭvido, glosolalio, ŝajna reenkarigi ktp. Neniu rakonto atingas pli ol du mil vortojn; neniu tedas, preskaŭ ĉiu surprizas, ĉiu interesas, kelkaj korŝiras.


Malfacile estas taksu la arton de Betty Salt kiel tradukisto, parte ĉar, kompreneble, oni ne kunpresigis la originalojn, parte ĉar, inter la rakontoj kaj eĉ inter la teatraĵoj, ofte troviĝas "bone konata rakonto", "mondfama rakonto", "vera historio", "vera rakonto krom pri minoraj detaloj", "vera rakonto, laŭ hinda onidiro". Ni ne ĉikanu; ĉu ŝi tradukas, ĉi ŝi verkas originale, la stilo de Betty Salt estas konstanta. Mi kore rekomendas la kolekton kiel legolibron, stilpolurilon kaj monumenton al grandanima esperantistino.

Katelina Halo · Britio

de *Aventuroj de pioniro* de Privat, tamen, tiuj de Harry estis origine anglalingvaj, kaj nur por ĉi tiu eldono esperantigitaj.

Kiuj unuavice legu la librojn? Certe, ĉiuj kiujn interesas la Esperanto-kulturo. Due, esploristoj de nia movada historio nepre konsultu ilin. Trie, kaj tre grave, ĉiu komencanta esperantisto kiu ankoraŭ dubas ĉu vivo en Esperantujo povas doni ion vere interesan por la vivo, povas konvinkiĝi per du brilaj ekzemploj ke la vivo kun kaj por Esperanto estas eksterordinare riĉa.

Nikolao Gudskov · Ruslando

 Kun viaj kontribuaj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Koran dankon!

## Sulko-fosa tasko novece plenumita

**The Grammar of Esperanto. A corpus-based description.** Christopher Gledhill (1968). Red. U. J. Lüders. München / Newcastle: LINCOM Europa, 1998. Languages of the World/Materials 190. 100p. 21cm. € 36,90.

Per tiu ĉi kontribuo, Gledhill partoprenas lingvaro-priskriban entreprenon kiu aparte surtagordigas la malpli vaste parolatajn lingvojn. Post mallonga sed por la celpubliko tre taŭga prezento pri la socia realo de Esperanto, Gledhill okupiĝas pri ĝia leksika kaj gramatika strukturo. Li venigas al la multe fositaj E-gramatikaj sulkoj la metodikon de laŭkorpusa priskribado. Pedagogoj kaj faciltekstaj redaktoroj de longe scias ke la vort-oftecoj devas nin gvidi en la sinsekvigo de instruotaj lingveroj. Sed nur lastatempe oni ekkapablis kunmeri kaj prisiĝi korpusojn por pli ĝenerala statistika pridemandado. La korpuso de Gledhill, 156 tekstoj liverintaj 312 130 sinsekvajn vort-aperojn (de 37 435 malsamaj vortoj), larĝe gamanta tra tekstotipoj (ĵurnalismaj, juraj-administraj, literaturaj kaj personaj) inkluzivas originalojn kaj tradukojn. La evitado de tradukoj, normala ĉe korpuskonstruantoj, spegulas la etno-

*The Grammar of Esperanto*

Christopher Gledhill

Lincom Europa

proprecon de ordinaraj lingvoj. Gledhill rezonas ke ĉe interlingvo almenaŭ specimena korpuso enhavu ankaŭ tradukojn, dum oni atendas la konstruon kaj pritrakton de seriozampleksaj korpusoj.

Bazante siajn konkludojn sur troviĝoj, netroviĝoj kaj oftecoj en la tekstara korpuso, do, Gledhill faras distingojn inter pli kaj malpli esencaj lingveroj ne nur en la leksiko (kie la Funda-

mento, la vortoftecoj pedagogiaj, la Baza Radikaro Oficiala jam reliefigis tiun demandon), sed eĉ en la gramatiko. Ekzemple, li faras la — verŝajne novan — priskriban konstaton ke “Unu eco de nereakta komplementa prepozicio estas ke ĝi ne povas esti uzata prefikse al verbo (komparu [...] *\*aldonaci*, el komplementa *al*, kun *prizorgi*, el modifila *pri*)” (p. 67). Tamen, diference de pure priskribisma metodo, kiu rekomendus senplian fidelon al ĉia ajn fakta uzado de parolantoj kaj skribantoj, Gledhill kreas novan ekvilibron inter

emfazo pri la stabila kerno kaj atento al la variemaj konturoj de la lingvo.

En la lastaj jardekoj, multaj voĉoj alie tre diversaj, de Schubert tra Pool ĝis Silber, ofte rimarkigis ke kreskos la sano de niaj interparoloj, se ni nin ne enfermos en eventuale malobjektivigajn getojn, sed turnos al la aktuala esplora mondo, en kiu devas ĝenerale diskutiĝi ĉiuj demandoj. Gledhill ŝajnas al mi krei sanan spacon por lingva priskribado. Lia senpera kaj ekvilibra uzado de normalaj priskribiloj ne simple paŭsas alijulajn iniciatojn en Esperantujo aŭ en tiu specifa lingvosciencia skolo, kaj ankaŭ ne manifesto-stile lanĉas propran skolon. Li nome venigas al la sulko-fosa tasko ne nur korpuson, sed internacian fosilaron elektran el vasta gamo — el la tradicia Esperanta gramatiko, historia-kompara lingvistiko, strukturismo, ĝenera lingvistiko, kaj ne laste el aktualaj frazeologiaj esploroj pri la specifa kunaperemo de difinitaj vortospecoj.

Kompreneble, neniu leganto povas konsenti pri ĉio en tiu ajn libro. Mi atendas de estontaj versioj de tiu ĉi verko pli ekvilibran kaj nuancan traktadon de la naturo de la afiksoj. La tiel nomata “sendependeco” de la afiksoj estas forta propraĵo de la Esperanto. Restas nesolvita demando kiel plej bone priskribi tiun faktoron en sufiĉe neŭtrala kaj ĝenerale prezentinda gramatiko. Mi bonvenigas ĉi tiun relevon de la tuta temaro, en kiu tiu demando plej nature pridebatiga.

Probal Daŝgupto · Barato

## Lingvo sen korseto

**Slango kaj jargono en Esperanto.** *Provizora privata listo de slango kaj jargono (kaj aliaj ne-PIV-aj signifoj).* Wouter F. Pilger (1942). Debrecena E-Societo, 1998. 40p. 21cm. € 3,90.

Ĉiuj vivantaj lingvoj evoluas laŭ kreado de novaj vortoj kaj signifoj. Ankaŭ Esperanto, teliĉe. Verkoj listigantaj novajn uzojn, ankoraŭ ne sankciitajn de la plej komitaj vortaroj, estas speciale dankindaj, ĉefe en malpli disvastigitaj lingvoj — kiel Esperanto —, kie fideleco al normoj aparte gravas por ke ili ne dismalaperu. Tamen tiu strebado al fundamenta komuneco ne povas tiel korseti lingvon ke ĝi fariĝu kadavre rigida.

W. F. Pilger faris elstaran laboron. Ĉ. 1200 signifoj de vortoj kaj esprimoj aperas kun abundaj ekzemploj kaj fojaĵ, interesaj klarigoj aŭ hipotezoj pri ilia deveno. Plimulto ne ŝokas: ekz. de longe enradikiĝis en Esperanto la kutimo aludi al certaj lingvaj devioj per la nomoj de grandaj kvarpedaj rampuloj. Aliflanke, la aŭtoro listigas ankaŭ plurajn “komputisimojn”, kiuj iĝis komaraj en certaj mondpartoj (*ĵurno, reto*), kvankam ili oni apenaŭ povas jam konsideri jargono kaj des malpli slango. (La Pilgeran difinon de slango mi plene subtenas: “uzo de vorto, kiu, aŭ kies signifo estas bone konata interne de iu grupo, kaj malpli bone ekstere [...] per tio oni sentigas sian grupamecon. . . ofte temas pri ĝuste iom alia signifo de konataj vortoj”.) Ne malmultaj kompilitaj esprimoj konsideriĝas ne tiom slangaj kiom simple familiaraj, kiel *astronomiaj stimoj* (grandegaj), *draŝi* (forte kritiki), *drogo* (narkot-

aĵo), *fajfi je io* (ne zorgi pri io), *serio* (aro de sinsekvaj televidaj programoj) ktp.

La kernon de la vortaro konsistigas ĉefe, sed ne nur, metaforaj aŭ troigaj uzoj de malnovaj vortoj aŭ esprimoj. Specimene: *cerbukurado* (kompleta opini-saĝo), *gluti decidon* (akcepti ion mallacile akcepteblan), *kaĝo* (kadludejo por infaneto), *saluton!* (saluton! k.s. La granda plimulto de la esprimoj vivas ne nur en la lingvouzo de la aŭtoro, sed verŝajne ĉe multaj e-istoj. Iuj parolformoj mi ne konas: *muro mono* (el automato), *ferdekbuso* (duaĵaĝi), sed la aŭtoro ja avertas ke temas pri “provizora privata listo”.


Verko ne celanta (apenaŭ eblan) kompletecon ja havas ankaŭ siajn mankojn, ekz. rilate esprimojn por drogoj kaj por multaj komputikaj (kiel *cimo* aŭ *ĉsluti*).

Ĉiel ajn, valora kaj dankinda vortareto.

Hektor Alas i Font · Katalunio



# Laste aperis



LA SUBAJNTITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiginoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 2,25 eŭroj. Antaŭdankon pro via mendo!

**Avo en la ĉareto, La (1988).** Gudrun Pausewang (1928). Bildoj de Inge Steineke. El la germana trad. Nora Caragea. Frankfurt: la tradukinto, 1999. 62p. ISBN 3 00 004992 4. 21cm. Bind. Ĉarma rakonto pri avo kaj nepo, pri la sencoj kaj ĝojoj de la vivo. Por infanoj super 10 jaroj. € 9,30.

**Fadenoj de l' amo (1989).** Gerrit Berveling (1944). Chapecó: Fono, 1998. 104p. 21cm. Romaneto pri "vojaĝaj peripetioj de gea triopo". Verko "elektita de Esperantlingva Verkista Asocio". € 12,00.

**Granda vortaro vjetnam- Esperanta. Dai tú diên Viêt- Esperanto.** Nguyễn Minh Kính (1914). Hà Nội: Mondo-Eldonejo, 1999. 20+1412p. 24cm. Bind. Enorma konsultverko, riĉa en ekzemplofrazoj. € 36,00.

**Kapturnoj.** Higinio García (1939). Antverpeno: Flandra E-Ligo, 1999. 159p. ISBN 90 71205 82 7. 21cm. 12 makabraĵaj noveloj (iuj aperintaj en *Monato*) pri estonta, nedezirinda sed tamen imagebla socio. € 16,50.

**Koreaj rakontoj.** Wien: Aŭstria E-Movado [1999]. 43p. 21cm. 14 popolfabeloj. € 4,20.

**Kosmopolitischer Humanismus (Homaranismo). Konzepte der Esperanto-Kultur...** Helmut Welger (1946). Marburg: Info-Servo, 1999. 6+87p. 30cm. Ringe bind. Germanlingva. Komentoj al la Fundamento de Homaranismo, formulita en 1985 laŭ la ideo de Zamenhof. € 9,90.

**Marionetoj.** Carmel Mallia (1929). Berkeley: Bero, 1999. 62p. ISBN 1 882251 28 8. 22cm. Poemaro "ege supera" al la antaŭaj de la malta aŭtoro, esprimanta "sian insulecon, sian arabecon kaj precipe sian homecon" (G. Neves). € 5,40.

**Mi, vi, ci kaj ĉiuj tiuj aliaj. Kiel efektive uzigi la mondan nomaron.** Jeremi Gishron (1948). Jerusalem: Centro Sivron, 5759/1999. 15p. 21cm. € 1,50.

**Pafo, La (1830).** Aleksandro Puŝkin (1799-1837). El la rusa trad. (1923) d-ro Andreo Fiŝer. Wien: Aŭstria E-Movado [1999]. 23p. 15cm. Novelo tradukita "en lingvo ŝpruce moderna" (*Esperanto en perspektivo*), sed kelkloke arbitre ŝanĝita de la nuna editoro. € 1,80.

**Papo Johano Paŭlo II en Esperantaj publikaĵoj, La. Bibliografio 1992-1996.** Krystyna Macińska (1924). Rzym [Romo]: Fundacja Jana Pawła II, 1998. 55p. ISBN 83 7019 288 2. 25cm. 335 registraĵoj, kun indekso. € 4,80.

**Poeziaĵoj. Versaĵoj propraj kaj tradukitaj.** Julian Tuwim (1894-1953). El la pola trad. L. Belmont, I. Lejzerowicz k.a. Łódź [: Pola E-Asocio, Filio en Lodzo], 1994. 129p. ISBN 83 86058 22 6. 21cm. Represo (1956). Elektitaj verkoj, kaj polaj poemoj esperantigitaj de la granda poeto mem. € 4,80.


**Potem. 732 sonetoj dulingve.** Jan Stanisław Skorupski (1938). Zürich: editiō L., 1999. 370p. ISBN 3 9521492 1 7. 15cm. Dulingva: E-pola. Poezia taglibro de aŭtoro kiu "skribis pli multe da sonetoj ol ĉiuj konataj poetoj en la tuta historio de literaturo". € 13,50.

**Repertorio 2. NBN-nomoj 1401-2400.** Kalmthout: Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklatur, 1997. 86p. 30cm. Kvarlingva: E-angla-franca-nederlanda. € 7,50.

**Tikveŝa legendo (1944).** Lazo Karovski (1927). El la makedona trad. Vera Ĉornij. Skopje: Makedonia E-Ligo, 1991. 20p. 20cm. Longa poemo epika, popoleca. € 3,90.

**Vienaj legendoj.** Vieno: Aŭstria E-Movado [1999]. 28p. 21cm. Kvin historietoj. € 2,70.

**De maldekstre supre: originala novelaro; bela infanlibro; tri polaj volumoj.**



**Poemoj el Ho Chi Minh kaj To Huu.** Ilus. Trần Quân Ngoc. El la vjetnama trad. Đào Anh Kha. Hanojo: Mondo, 1999. 209p. 19cm. Dulingva. Elektitaj verkoj de "du plej famaj poetoj de la nuntempa Vjetnamio". € 2,40.

**Poeziaĵoj (1909-23).** Stanisław Braun (1893-1956), Stanisław Karolczyk (1890-1966). Łódź: Pola E-Asocio, Filio en Lodzo, 1997. 96p. 21cm. Elektitaj poemoj de du polaj aŭtoroj pioniraj ("Elski kaj Eska"), konataj pro la komuna verko *Unuaj agordoj* (1910). € 4,80.

## VIDBENDO

**Esperanto – pasporto al la tuta mondo. Lecionoj 5-8.** Verkita de d-ro Paul Gubbins, laŭ koncepto de Edwin Grobe. El Cerrito: E-Ligo por Norda Ameriko, 1999. 120 min. PAL. Pluaj 4 eroj de 15-leciona kurso pri la Esperantaj lingvo kaj kulturo. Filmita de profesuloj. Akompana kajero kun la kompleta teksto. € 76,50.



**KARL MAY**

## Liberigo / Eine Befreiung

La verkoj de la germana aŭtoro Karl May (1842-1912) de longe apartenas al la klasikaĵoj de la aventura literaturo. Unuafaje unu el liaj rakontoj tradukiĝis al la internacia planlingvo Esperanto kaj unuafaje teksto de Karl May troviĝas dulingva en unu libro.

Editorita de H. D. Steinmetz, trad. Cornelia Rau. Bamberg: Karl-May-Verlag, 1999. 240p. Bindita. ISBN 3-7802-3005-4. Prezo: € 18,30.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA (triona rabato ekde 3 ekz.)

# NAVIGE

## TRA TTT-PAĜOJ

Jen kelkaj verdaj gutoj el la  
inform-oceano de Tut-Tera  
Teksaĵo. Sciigu nin pri pluaj  
konsultindaj paĝoj Esperantaj!



### KULTURO

Borges en Esperanto (argentina projekto): <http://www.geocities.com/Athens/Forum/6167/>

KoToPo, internacia multkultura ejo en Liono (Francio): <http://ttt.esperanto.org/internacia/kotopo/>

Kultura Arta Festivalo de Esperanto (Tuluzo, julio 2000): <http://perso.wanadoo.fr/kultur.art.festival.eo/>

### LINGVO

Aŭtomata tradukado de Esperanto al la angla (sian propran instrukcian frazon "Tajpu frazon en Esperanto, kaj poste premu 'Sendu' por kruda Angla tradukaĵo" la programo angligas jene: "Type a sentence in Esperanto, and afterwards should press 'Sendu' for raw English translation"): <http://webalias.com/eoxx/>  
Kolekto de langorompiloj, ĝis nun 13 Esperantaj (kontraŭ ekz. 338 en la angla): <http://www.uebersetzung.at/twister/>

### NAVIG-HELPO

Interreta Orientiĝilo por Esperanto-Krozantoj indeksas Esperantlingvajn paĝojn laŭ 16-tema klasifiko, de "Amaskomunikiloj kaj informiloj" ĝis "Sporto kaj amuzo": <http://www.jec.net/retkompaso/>

### PERSONOJ

Juri Finkel (vd. Reagoj, p. 8), kun "literaturaj specimenoj" kaj konsultverkoj: *Esperanta-rusa vortaro* de Bokarev (kun serĉilo) kaj *Komputada Leksikono* de Pokrovskij (laŭ stato de junio 1999): <http://www.esperanto.mv.ru/>

Ĵerom Vaŝe (Jérôme Vachey), kun eseoj originalaj pri frazeologio kaj vort-statistiko, komputiko, lingvo internacia kaj "skriboj de la mondo", plus la beletraĵo *Kunkrementoj* ("sovaĝa tekst-muntaĵo el gazetaĵoj, reklamoj, sonĝoj kaj aliaj rubaĵoj de la vivo"): <http://ourworld.compuserve.com/homepages/jvachey/>  
Galerio de E-istoj, de Colin Simmonds (Birmingham, Anglio), ĝis 13 dec. fotoj de 23 homoj el 11 landoj kaj 4 grupoj el 3 landoj: <http://home.clara.net/firebird/>

### POLITIKO

Alvoko kontraŭ tro liberala komerco tutmonda kaj por la "respekto, fare de la Monda Organizo de la Komerco, de la Universala Deklaracio de la Homrajtoj kaj de ĉiuj internaciaj konvencioj": <http://www.etats-generaux.ras.eu.org/esperanto.html>

### REVUOJ

*Afrikanio*, "via unua reta revuo afrika", red. Herman Nyeck Liport: <http://www.africnature.com/tete1.htm>

*Perua Esperanto-Bulteno* (1-a n-ro: okt. 1999): <http://www.geocities.com/amikoj/>

### SOLIDARECO

La MalsaTTTejo ("The Hunger Site"), lingve ne, sed spirite ja ligita al Esperanto, rekomendita de la Nutraĵ-Programo de UN. Klakante butonon, vi sendigas nutraĵdonacon al malsatanto, pagatan de sponsorantaj firmaoj: <http://www.thehungersite.com/>

Kaj plue...





Sul kaj de proksimaj urboj, sed ĉiu estas bonvena. Skeĉoj estas ja troveblaj en *Facila skeĉ-albumo* de Bertram Potts, en libretoj de Stefan MacGill k.a., sed Coelho invitas ĉiujn verki, traduki aŭ adapti skeĉojn kaj sendi ilin al li. (*Evento*)

**GERMANIO: GEJ-Gazeto iĝas Kune**


La revuo de Germana Esperanto-Junularo, *GEJ-Gazeto*, ŝanĝas sian nomon al *Kune*, pro pluraj kialoj: jam ĉe la lanĉo en 1979, la nomo *GEJ-Gazeto* estis konsiderata kiel provizoraĵo; eksteruloj povis eventuale miskompreni *GEJ* kiel *gej'* ("samseksemulo"); krome, la nova, mallonga nomo estas facile prononcebla por germanoj.

**KROATIO: Aktivige en vilaĝo**  
La ŝtata instituto por protekto de familio, patrinoj kaj junularo donis subvencion al 8 gejunuloj por partopreni en la vilaĝo Dejana Hruškar la projekton Es-

# Jen la plej

**KONTAKTO** estas gazeto por ĉiu kiu serĉas interesan legaĵon en Esperanto. Ĉiu numero havas ankaŭ tekstojn en tre facila lingvo, tiel ke **KONTAKTO** estas aparte taŭga por komencantoj kaj por Esperanto-kursoj. Krome, konkurso atendas vin en ĉiu numero de la revuo! En 2000 **KONTAKTO** aperos 6-foje. Abonu rekte de UEA aŭ ĉe via kotizperanto.

vaste legata junulara gazeto rekomendinda por komencantoj diversa kaj amuza interesa por ĉiuj



**ABONTARIFO 2000**

Aŭstralio	31 dolaroj	Francio	120 frankoj	Nederlando	39,67 guldenoj
Aŭstrio	250 ŝilingoj	Germanio	36 markoj	Norvegio	150 kronoj
Belgio	740 frankoj	Hispanio	2600 pesetoj	Pollando	9 eŭroj
Brazilo	9 eŭroj	Israelo	14 eŭroj	Portugaliao	2900 eskudoj
Britio	13 eŭroj	Italio	36000 lirej	Svedio	165 kronoj
Danio	135 kronoj	Japanio	2300 enoj	Svislando	28 frankoj
Finnlando	110 markoj	Kanado	29 dolaroj	Usono	20 dolaroj

**Granda rabato por grupaj abonoj ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!**

peranto, kiu celas aktivigi gejunulojn ekster la ĉefurbo kaj disvastigi Esperanton inter ili. (*La Ondo de Esperanto*)

**NEDERLANDO: Homo de la 20-a jarcento**

La nederlanda poŝto ekvendis la 25-an de okt. 10-pecan poŝtmarkblokon pri "Kulminoj el la 20-a jarcento". El la dek bildoj nur du montras personojn, kaj unu el tiuj du estas ĝuste la esperantisto Willem Drees (1886-1988), kiu ekde 1947 artitektis la nunan socialan sistemon de la lando. Drees scipovis la lingvon, estis Alta Protektanto de la 39-a UK en Haarlem (1954) kaj dum jardekoj membris en la Honora Patrona Komitato de UEA.

**"Eta finvenkisto"**  
"Eble en mia cerbo mi rezignas, sed en la koro restas eta finvenkisto" — skribas Bård Hekland, recenzante en *Norvega E-isto* la verkon *Esperanto post la jaro 2000* (Diskutkajeroj de UEA) de Aleksander Korjenkov. Al la Korjenkova kritiko ke Kampanjo 2000 nur priskribas la ordinaran laboron per iom novaj vortoj, Hekland rebatas ke "valorigi la ĉiutagan laboron per kampanjo povas esti same grava kiel alporti novajn strategiojn."

**Maria: Manuskripto retrovita**  
*Andaj Ondoj* (Kolombio) raportas pri la retroviĝo de manuskripta traduko, farita de José Alfonso Gutiérrez en 1924, de la grava pasint-jarcenta romano *Maria* de Jorge Isaacs. Tamen, laŭ Luis Jorge Santos Morales, prezidanto de Kolombia Esperanto-Ligo, "la traduko ne estas bonkvalita". Ĉu *Maria* estas publikiginda aŭ "restos kiel kuriozaĵo de nia historio?" — demandas la revuo.

**KELKLINIE**

- *Riveroj*, la azia kultura revuo el Japanio (red. MINE Yositaka), ĉesos aperi post la sekva, 26-a numero.
- *Naturista Vivo* ŝanĝis redaktoron: post 12 jaroj, la hungaron Ervin Fenyvesi (82-jara), sekvas alia hungaro, Jozefo Németh (39-jara), kiu redaktas ankaŭ *Internacia Pedagogia Revuo*.
- Nova redaktoro de *La Cirkulaĵo* de Rondo Familia: Katarína Bodnárová, Hlavná 63, SK-07631 Streda nad Bodrogom, Slovakio.



madon en la plej legataj naciaj ĵurnaloj, kaj HEF preferis stariĝi profesian TTT-ejon. La estraro ne miselektis, ĉar ĉi tiu estas daŭre vizitata ne nur de miloj da scivoluloj, sed ankaŭ de ĵurnalistoj, kiuj alte taksas ĝian

kvaliton kaj rekomendas ĝin al siaj legantoj, ekz. en la semajna virina gazeto *Mujer de Hoy* (23-29 okt.)

**NEDERLANDO: "Pinta" atingo**  
En la senpaga, larĝe distribuata

taggazeto *Spits* ("Pinto", "pinta trafikhor") la 1-an de dec. granda artikolo invitis "Festi kun Esperanto", surbaze de interparolo kun Dmitri Horowitz kaj David van Bezooijen, precipe pri Nederlanda E-Junularo.

**BRAZILIO: Radio en Rio**

Ekde la 5-a de okt. en Rio-de-Ĵaneiro ĉiumarde elsendiĝas, de 15:00 ĝis 15:55, radioprogramo pri Esperanto, kaptebla en kaj ĉirkaŭ la urbo. Givanildo Ramos Costa prezentas ĝin parte Esperantlingve, parte portugale. (Informa Servo de AERJ)



**JAKUBINYI: Plia pledo**

En oktobro okazis en Vatikano eŭropa sinodo, en kiu 240 katolikaj episkopoj kaj delegitoj analizis la nuntempan situacion de la eklezio kaj serĉis perspektivojn. Kadre de 8-minuta prelego, la ĉefepiskopo de Alba Iulia (Rumanio), György Jakubinyi (56-jara), atentigis pri E-o kiel ebla solvo de la lingva problemoj en la katolika eklezio. Li same faris en sinodo jam en 1991 (vidu majo '99, p. 99). Kiel novan argumenton, nun li menciis ke li "estas kontraŭ la uzo de denaska lingvo kiel liturgia", ĉar tio estas "rimedo de asimilado kaj homogenigo de la naciaj minoritatoj." (U. Matthias, C. Sarandrea)



**VOLONTULOJ: Kelorda kinopo**

La CO povas gastigi samtempe ne pli ol du volontulojn. Tamen, en iu septembra tago kruciĝis la deĵor-periodoj de ne malpli ol kvin el ili. Jen, de maldekstre: Rubén Diaconu (Argentino), Raoul Hounnake (Togolando), Sandra Schweder (Germanio), WANG Jianbing (Ĉinio) kaj Katja Evlampieva (Ruslando).

**GREKIO: Ståhlberg rakontas**

Post retroŝta intervjuo de Sotiris Vadoros kun la redaktorino de *Kontakto*, Sabira Ståhlberg, tuta paĝa artikolo pri Esperanto aperis en la grava greka ĵurnalo *To Vima* (25 jul.). Ståhlberg rakontas pri siaj diverslandaj spertoj kiel redaktoro kaj E-uzanto. Anstataŭ kredi amaskomunikilojn, ŝi argumentas, estas pli bone havi personajn kontaktojn kun homoj tra la mondo, lernante pli respekti la opiniojn de aliaj.

**HISPANIO: Investu en TTT**

Kiam la estraro de Hispana Esperanto-Federacio "decidis investi parton el siaj magraj enspezoj en la kreado de hispanlingva informejo" — rakontas Miguel Gutiérrez en *Boletín*, la altaj kostoj malebligis infor-

HU-2600 Vác, Hungario) verkis faklibron pri optiko, taŭgan por komencantaj studentoj, kun matematika materialo kiu estas komprenebla per mezlernejaj

scioj. Li invitas fakulojn doni siajn komentojn. La verko estas trovebla ĉe <http://www.hungary.net/esperanto/libroj/optiko.zip>. (Eventoj)

**SÁRKÖZI: Optika faklibro**

János Sárközi (67-jara; Pf 127,

*Oficiala informilo*

**DONACOJ 1999 (EUR)**

ĝis la 30-a de novembro

**Asocia Kapitalo:** Francio: Pierre du Cheyron du Pavillon 3648,91. Sumo ĉi-jara: 84 999,28.

**Fondaĵo Afriko:** Germanio: Bahaa E-Ligo 70,34; I. Tautorat 153,39. Italio: M. La Torre 20,00; D. Trombetta 3271,20. Nederlando: Anonime 2268,90. Rumanio: E. Mustea 104,08. Svedio: J. Hammarberg 45,88. Sumo ĉi-jara: 16 782,57.

**Fondaĵo Ameriko:** Svedio: J. Hammarberg 11,47. Sumo ĉi-jara: 3194,44.

**Fondaĵo Azio:** Japanio: A. Aoyama 36,20; M. Ebata 18,10; E-Ligo de Sikoku 18,10; Y. Hayakawa

18,31; T. Huzimoto 18,09; K. Katou 27,15; T. Konisi 18,31; H. Kumaki 18,31; E. Miyosi 91,58; K. Murata 45,25; S. Nagura 36,63; H. Okuda 18,31; S. Oogusi 18,10; A. Saiki 18,10; R. Sasaki 18,31; T. Sugano 18,31; T. Sugihara 18,31; SYŌZI K. 90,50; M. Takezaki 18,31; M. Tamura 25,60; TAKEHANA T. 36,63; T. Ueda 18,10; M. Yosida 18,10. Rumanio: E. Mustea 104,09. Sumo ĉi-jara: 3230,30.

**Fondaĵo Canuto:** Aŭstralio: T. M. Metherall 5,00. Francio: Y. Vierne 24,05. Rumanio: E. Mustea 104,09. Svedio: R. Moln 15,00. Sumo ĉi-jara: 4265,13.

**Konto Espero:** Japanio: E-Rondo Senboku 29,86; T. Hukuti 29,13; G. Kimura 29,13; H. Matumoto 29,85; S. Mitukawa 29,12; T. Nagai 87,36; M.

Nakayama 30,22; M. Suzuki 30,22; S. Takizawa 30,22; M. Toyoda 29,86; T. Uehara 87,38; K. Yamakawa 116,52. Norvegio: D. Draper 120,77. B. Gustafson 241,55. Sumo ĉi-jara: 6179,19.

**Triamonda Kongresa Fondaĵo:** Aŭstralio: T. M. Metherall 5,00. Francio: F. Simonnet 60,00. Sumo ĉi-jara: 1080,76.

**Volontula Fondaĵo:** Aŭstralio: T. M. Metherall 5,00. Sumo ĉi-jara: 8057,23.

**Kampanjo 2000:** Nederlando: F. J. R. van Mook 36,30. Sumo ĉi-jara: 1805,63.

**Generala Kaso:** Germanio: R. Hirsch 6,75. Nederlando: F. D. v Zoest 11,35. Sumo ĉi-jara: 3799,38.

*Al ĉiuj tre koran dankon! USA*



# NOVA TELEVID-SERIA KURSO

VERKITA DE PAUL GUBBINS  
KUN JUNAJ TALENTAJ  
ESPERANTISTOJ EN LA ROLOJ

POR INSTRUI  
ESPERANTON

*Esperanto – pasporto al la tuta mondo* konsistos el 15 lecionoj (po 30 minutoj) kaj akompana presita materialo, celantaj individuon aŭ grupon studadon. La distra historio konstruita sur didaktika bazo faciligas kaj ĝojigas la lernadon. Ĉiu leciono okazas plene en Esperanto.

La kontinueco de la aventuroj de familio Bonvolo, la televidseria karaktero, kaj la vigla kaj sprita dialogo katenas la atenton.



La resumo detale traktas la ĉefajn gramatikajn erojn prezentitajn en ĉiu ĉapitro. Skrib-ekzercoj, verkita de Stefan MacGill, kompletigas la lecionojn.

La unuaj ok lecionoj jam aperis kaj estas vaste laŭdataj. Prezo de unu kompleto de kvar lecionoj (1-4 aŭ 5-8): €76,50 plus imposto 6% (nur por la landoj de Eŭropa Unio) kaj sendokostoj 10%. Menu en PAL ĉe la Libroservo de UEA. NTSC estas mendebla ĉe ELNA.

*Guu kaj ĝuigu Esperanton kun la familio Bonvolo!*




(<http://won.wonbuddhism.or.kr/~esperant/s-libroj/sain.html>) de la origine korelingva libro. Nun alia esperantisto mongoligas la libron, same el Esperanto. Se vi interesiĝas traduki la libron en vian lingvon, turnu vin al CHOE Taesok (☐[chtaesok@hitel.net](mailto:chtaesok@hitel.net)).

## TURISMO: Novaj informiloj

• En Francio, en la arkeologia regiono de Civaux, la turisma oficejo kaj muzeo proponas 2-paĝajn informilojn en 5 lingvoj, i.a. en Esperanto. En Perpinjano la loka e-ista kulturcentro (72, Av. du Général de Gaulle, FR-66000 Perpignan) eldonis la 5-lingvan turisman libron *Perpignan, kataluna urbo*. (Norda Gazeto)

• Dank' al la laboro de la E-grupo en Erlangen, aperis prospekto en Esperanto pri tiu germana urbo, petebla de la turisma oficejo (Verkehrsverein Erlangen, Rathaus, Neuer Markt 1, DE-91052 Erlangen; ☐[tourist@stadt.erlangen.de](mailto:tourist@stadt.erlangen.de)) (B. Maurer)

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kosta 1,60 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton ĉe ripeto de anonceto. La tarifon de anoncoj vd. en la kolofono, sub la enbavtabelo.



# ANONCETOJ

**MEMORIGAĴOJ DE SINMORTIGINTO** – de Spirito Camilo Castelo Branco, pri sia vivo en Transmondo, 554-paĝa; eldonis Spiritia Eldona Societo F. V. Lorenz. Mendebla ĉe UEA.

**FRANCAJ INFANOJ** el la lernejo Louis Buton, en la vilaĝo Aizenay, lernas E-on de pasinta aprilo kaj ŝatus korespondi Interrete kun infanoj. Groupe scolaire Louis Buton, ☐[aizenay.louisbuton@wanadoo.fr](mailto:aizenay.louisbuton@wanadoo.fr).

**ORIENT-GERMANA E-ISTA LIGO:** ĉu vi havas materialojn, memorajojn pri OGELO? Edward Kozyra, ul. Mazowiecka 23, PL-82-200 Malbork, Pollando.

**17-JARULINO EL ARGENTINO** korespondus kun similaĝaj gesanoj. Cecilia Prudkin, Paso de la Patria 118, AR-8300 Neuquén Capital, Neuquén, Argentino.

**DETRUITA ESTAS NIA E-DOMO** en Sanica (Bosnio kaj Hercegovino). Mi serĉas esperantistojn kaj homojn kun bona volo por rekonstruado. Drago Smolić, Riemekstr. 3, DE-33102 Paderborn; ☎+49/5251/23-527, ☐26-981.

**52-JARA LINGVOINSTRUITINO** deziras korespondi kun samaĝulino. Ŝatas legi, traduki, korespondi, interŝanĝi revuojn. Lenke Szász, Guarii nr. 130, bloc. et. II, ap. 7, RO-4174, Praid, jud. Harghita, Rumanio.

**GEJUNULOJ 16-20-JARAJ** el ĉiuj landoj korespondu kun Tania Ŝapel, Lentupio 24, LT-4730 Sveineionis, Litovio. 16-jara lernantino, ŝatas sporti kaj danci.

**SKRIBU AL 12-JARA KNABO** (moneroj, kalendaroj, vojaĝoj): Dmitriĵ Varlamov, ul. Diksna 31-1, Krasnojarsk, RU-660020, Rusio.

La redakcio kaj la Centra Oficejo bondeziras al vi okaze de la jarfinaj festoj.

**Mika ANDRIĆ** (1933-1999), dumviva membro, kiu aktivis de 1955 en Sarajevo kaj Beogrado, mortis la 7-an de septembro en la jugoslava ĉefurbo.

**Paul van den BERG** (1931-1999), prezidinto (1975-88) de Nederlanda Societo de Blindaj kaj Malfortevigantaj E-istoj, instruisto pri la angla kaj Esperanto, mortis la 15-an de julio en Heemskerk.

**Germano GIMELLI** (1913-1999), honora membro de Internacia Fervoja E-Federacio, forpasis la 12-an de novembro en Gallipoli (Italio). Li aktivis kiel sekretario de Itala Fervoja E-Asocio, redaktoro de ĝia informbulteno (1954-84) kaj prezidanto (1984-95), poste honora prezidanto. Li estis LKK-ano de la 40-a UK (Bolonjo, 1955), fakdelegito pri fervojoj kaj filatelo dum kvar jardekoj, loka delegito en Bolonjo kaj membro de Itala Instituto de Esperanto, ĉe kies Bolonja katedro li organizis multajn kursojn kaj ekzamensiojn.



Kompletas de Romano Bolognani

**Werner HEINRICH** (1904-1999), dumviva membro kaj longtempa ano de Societo

Zamenhof, mortis la 6-an de oktobro en Berlino. E-isto de post la dua mondmilito, dum multaj jaroj li gvidis grupon en Berlino.

**Kimiharu KIMURA** (1910-1999), esperantisto de 1932, iama delegito, forpasis en Sapporo (Japanio).

**Herbert KOPPEL**, unu el la plej aktivaj e-istoj en Aŭstralio de post sia ekloĝo tie en 1949, forpasis lastatempe. Li agadis kiel sekretario (1950-67), poste vicsekretario, de Aŭstralia E-Asocio, kaj redaktis ties revuon *The Australian Esperantist* de 1974 ĝis 1988. Li organizis plurajn naciajn kongresojn en Melburno kaj la 1-an Pacifikan Kongreson en 1976.

**Willi MACHLEIDT** (1934-1999) mortis la 15-an de novembro en Berlino, kie en la 50-aj jaroj li apartenis al la tiam aktiva junulara E-grupo.

**Stevan MINJA** (1924-1999), aktoro, membro de la iama Beograda Esperanto-Teatro, forpasis la 4-an de aprilo, dum bombardado de Beogrado.

**Marjatta RAUTIO** (1926-1999), iama delegito en Kuhmo (Finnlando), estrarano de E-Asocio de Finnlando en la 70-aj jaroj, mortis la 28-an de septembro en Helsinko.

**Ulf RIBERS** (1913-1999) forpasis oktobre en Motala (Svedio). Dum multaj jaroj li grave rolis en la sveda E-movado, i.a. kiel aktivulo de la eldonejo Progreso.



El *Abundo kaj Redunde*

**Josef RUMLER** (1922-1999), ĉeĥa kaj Esperanta poeto kaj tradukisto, honora membro de Ĉeĥa E-Asocio, mortis la 1-an de novembro en Prago. Aŭtoro de 4 ĉeĥlingvaj poemaroj, e-isto li fariĝis en 1978 kaj tuj komencis aktivi literature, i.a. per la poemkajeroj *Kvarfolio* (1985; kun Urbanová, Karen kaj Vidman), *Matena melkado* (1987) kaj *Lasta ĉevalo* (1992); la tradukaj *52 nuntempaj ĉeĥaj poetoj en 1000 versoj* (1989), *Inoj* de F. Halas (1996), *Kristnaska tago* de K. J. Erben (1999), kaj per oftaj kontribuoj al *Fonto*. Li klarigis siajn ideojn pri la beletra lingvo Esperanta en la eseo *Abunde kaj Redunde* (1986), kiu vekis vastan diskuton.

**Frank STRAHL** (1927-1999) forpasis la 1-an de septembro en Lund (Svedio). E-isto multjardeka, li aktivis precipe de 1993, apogante "ĝemelajn" samideanojn en Mwanza (Tanzanio) kaj kiel unu el la iniciatintoj de sunenergia projekto por tiu lando.

## Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo):** S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎ +61-2-9810-4227; 📠 +61-2-9555-9705; ✉ kependerby@bigpond.com.

**Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financo):** d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; 📠 +39-06-957-66-33; ✉ corsetti@itelcad.it.

**Ĝenerala Sekretario:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; 📠 +39-06-39-72-61-69; ✉ lipari@esperanto.nu.

**Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado):** d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio; ☎ +420-2-991-2201; 📠 +420-2-991-2126; ✉ chrdle@telecom.cz.

**Estrarano (Afrika agado):** s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-27-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.

**Estrarano (kulturo, landa agado):** s-ro Tacuo Huĝimoto, Kubota 31, Sakio-ku, Kyōto, 606-8266, Japanio; ☎/📠 +81-75-711-45-58; ✉ jasu-k@mac.email.ne.jp.

**Estrarano (informado):** s-ro Kalle Kniivilä, Skyttelinjen 55, SE-226 49 Lund, Svedio; ☎ +46-70-636-93-78; ✉ kalle@esperanto.se.

## Fondaĵo Canuto

*Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!*

## FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

### fariĝu patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- *TEJO tutmonde* (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn.

# LA ONDO DE ESPERANTO

Ĉiumonata soci-kultura revuo kun literatura suplemento jarfine

- Tra Esperantujo: Faktoj, problemoj, komentarioj
- Tiel ni vivas: Raportoj el la postkomunisma mondo
- Civilizo: Kia estis, estas kaj estos la mondo?
- Esperanto: lingvo, komunumo, kulturo
- Noveloj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj
- Mozaiko: konkursoj, kvizoj, krucvortenigmoj, humuro

Abonebla kontraŭ 22 eŭroj ĉe UEA kaj landaj perantoj  
Provezemplero ĉe RU-620077 Jekaterinburg-77, pk 67, Ruslando

## ANONCU EN LA ELDONAĴOJ DE UEA KAJ TEJO!

(Prezoj en EUR)	1/1p.	1/2p.	1/4p.	1/8p.	1/16p.
<b>Esperanto</b>	1000	550	300	165	90
<b>Kontakto</b>	350	190	100	55	30
<b>Jarlibro*</b>	380	200	110	-	-
<b>Kongresa Libro*</b>	225	125	70	-	-

Por Esperanto-organizaĵoj 50%-a rabato.

Makleraĵo de 30% al varbinto de ne-movada anonco.

Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble.

### \*LIMDATOJ:

Jarlibro: 2000 01 31; Kongresa Libro: 2000 03 31.

### ANONCETOJ:

**En Esperanto:** por ĉiu vorto unu internacia respond-kupono (=0,73 EUR).

**En Kontakto:** por tri vortoj unu internacia respond-kupono.

**En la Jarlibro:** por ĉiu komencita linio unu dekono de la MA-kotizo de la koncerna lando (oni ĉiam fakturas minimume du liniojn).

**En eldonaĵoj de UEA kaj TEJO via anonco atingos la plej vastan publikon!**

"Amuza, kleriga, alloga, humura kaj bonkvalita" – *Esperanto* (UEA)

"Ĉarmaj desegnaĵoj kaj intereso-streĉa teksto" – *Evento*

"Varme rekomendas al ĉiu volanta informiĝi" – *Kontakto*

"Intelekta kaj amuza frandaĵo" – *esperanto USA*

La Bildstria Gvido al

## GENETIKO

Verkis Larry Gonick kaj Mark Wheelis.  
Tradukis Sung Ho Cho. 1996. 216p.  
22cm. Mendu ĉe UEA. Prezo: € 12,00.



AIKIDO-spertuloj turnas kontraŭe la forton de la kontraŭbatalanto.

La forto de la angla lingvo estas ke milionoj da homoj *volas* ĝin lerni. Sed la lingvo estas stumbligema. Post longa lernado oni kapablas ĝin legi, sed nur malmultaj kapablas verki aŭ paroli senerare.

### Everyone's Own Language [Ĉies propra lingvo]

invitas legantojn uzi la anglan por lerni lerneblan lingvon. Ĵurnalistino ene rakontas kiel ŝi trovis Esperanton, legis Valane, kongresis, diplomigis pri lingvistiko. *Everyone's Own Language* celas kaj angla-lingvanojn kaj lernintojn; ĝi informas kaj bone instruas.

EU preskaŭ havas komunan valuton, la €. Mankas komuna lingvo.

Ankaŭ la terglobo kaj TTT bezonas lerneblan lingvon.

Dublin: Nitobe Press, 1999. 188p. ISBN 0-95352-840-5. Mendebila ĉe Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12; [esper@indigo.ie](mailto:esper@indigo.ie), UEA, ELNA kaj JEI.



## KEF 2000

17.-23.7.2000 en Helsinko, Finnlando

- Koncertoj
- Komiksoj
- Poemoj
- Noveloj
- Teatraĵoj


Ne enuu! Enamiĝu al kulturo!

Pliaj informoj:  
[www.esperanto.fi/kef2000.html](http://www.esperanto.fi/kef2000.html)  
aŭ  
Kultura Esperanto Festivalo  
Siltasaarenkatu 15 C 65  
FI-00530 Helsinki, Finnlando



## GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ

Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



**HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ.** Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 10,90.

# NOVAĴOJ

de la eldona fako  
de UEA

## RESPONDOJ PRI RASISMO

### PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO?

Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad.  
Armela LeQuint kaj Jak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999.  
52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm.  
Prezo: € 6,50.

"Infano estas scivolema. Ĝi faras multajn demandojn kaj ĝi atendas precizajn kaj konvinkajn respondojn. Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Pri la plenkreskuloj, kiuj ĝin legos, mi esperas ke ĝi helpos ilin respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj." (Tahar Ben Jelloun)

Tiu ĉi libro de la Marok-devena aŭtoro enorme furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.



## LEGOLIBRO EL KANADO




LITO APUD LA FENESTRO.  
Betty Salt (1907-1994).  
Ilustraĵoj de F. L. Veuthey.  
Rotterdam: UEA, 1999. 111p.  
ISBN 92 9017 068 9. 21cm.  
Prezo: € 4,80.

Simplaj rakontoj, teatraĵetoj kaj poemoj, kun kelkaj tradukoj el la kanada literaturo. Stile belaj, ili facile kaptas ankaŭ la malpli spertan leganton, dank' al relative facila lingvaĵo. Ankaŭ pro la mallongeco de la plej multaj tekstoj la libro bone taŭgas kiel progresiga legaĵo.

## POR FACILE TROVI ALIAN VORTON

ESPERANTAJ SINONIMOJ.  
Jaan Ojalo (1914). Rotterdam:  
UEA, 1999 (3-a korektita eld.).  
96p. ISBN 92 9017 067 0.  
19cm. Prezo: € 7,20.

Ofte oni sentas la bezonon vigligi kaj variigi sian stilon per uzo de sinonimoj aŭ de preskaŭ-sinonimoj. Por helpi en tio, la estona aŭtoro kompilis tiun ĉi vortaron. Bazita sur Plena Ilustrita Vortaro, ĝi enhavas 1925 kapvortojn kaj 5500-vortan indokson. Taŭga fonto por ĉiu kiu volas pliriĉigi sian vortostokon.



## KAJ PLIE...

**HEJMA VORTARO.** Esperanto-vortoj por hejmaj aĵoj kaj agoj kun traduko en dek tri lingvoj. 63p. 21cm. Prezo: € 7,50.  
**POR AKTIVA LINGVOPOLITIKO.** Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK, Prago. 71p. 21cm. Prezo: € 7,10.  
**KULTURO KAJ SANO.** Nova libro en la Unesko-serio de UEA pri sano el la socia vidpunkto. 42p. 21cm. Prezo: € 5,40.

TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando  
Telefono: +31 10 436 1044 Telefakso: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>